

EL POPOLA ĈINIO

中國新道

11
1997

ISSN 0032 - 4361

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA

KUL

Esperanto

V-19034/1987



Kongreso cele al la 21-a jarcento

Nova problemo por Ĉinio —
senlaboreco kaj reenoficiĝo

Pri la tibeta medicino



Turo en vespera krepusko

Foto de CONG XIANSHENG

INTER NI

Post kiam Ĉinio restarigis sian suverenecon super Hongkong en 1-a de julio, multaj legantoj kaj E-organizaĵoj sendis al ni gratulajn leterojn kaj faksaĵojn. Ni kore dankas ilin.

La letero de la Pakistana Esperanto-Asocio diras: "Ni, geesperantistoj de Pakistano speciale de la Pakistana Esperanto-Asocio, gratulas niajn samideanojn pro rekuniĝo de Hongkong kun via granda kaj kara lando, Ĉinio. Ni gratulas ankaŭ la loĝantojn de Hongkong pro tio, ke ili liberiĝis de la fremda registaro."

Prezidanto de Flandra E-Ligo, s-ino Florij Witdoeck, faksis al ni en la meznokto de la 30-a de junio: "Ni deziras al vi feliĉan reunuiĝon de Hongkong al Ĉinio!"

Multaj legantoj montris siajn esperon kaj bondezirojn rilate la revenon de Hongkong al Ĉinio. Poŝtkarto de Szentgyörgyi Zoltan el Hungario diras: "Mi kore salutas vin okaze de reveno de Hongkong al la patrino lando.

Mi deziras pluajn multajn sukcesojn al la Ĉina Popola Respubliko kaj ankaŭ al la tuta homaro!"

Josef Kondor de Germanio leteris: "Kun grandaj plezuro kaj kontento mi ellegis viajn revuojn (6/7 de 1997), precipe kun granda intereso mi legis la artikolojn pri Hongkong. Mi deziras, ke post la repatriiĝo de la giganta, riĉa, de ĉinoj loĝata Hongkong, efektiviĝu la ideo de karmemora Deng Xiaoping — Unu lando, du sistemoj."

La vortoj de Zoltan kaj Kondor esprimas la dezirojn ankaŭ de ĉiuj, kiuj amas pacon kaj progreson, ĉar se Hongkong sukcesos iri la vojon de "Unu lando, du sistemoj" kaj daŭre stabilos kaj prosperos, tio estos ne nur konforma al la interesoj de la Hongkong-anoj kaj aliaj popolanoj de Ĉinio, sed ankaŭ utila por la evoluo kaj progreso de la tuta homaro.

Kvin monatoj pasis post la reveno de Hongkong al Ĉinio. Hongkong-anoj diras, ke tie ĉio iras normale, la vivo ne ŝanĝiĝis.

La Red.

El Popola Ĉinio

11 [470] 1997




Renkontiĝo en Aŭstralio
Foto de Hou Zhiping

S-ro Lee Chong-Yeong (la dua de dekstre), s-ro Osmo Buller (la dua de maldekstre), s-ino Michela Lipari (maldekstre) kaj AEA-prezidanto Keppel E. Enderby en la urbodoma akceptejo de Adelajdo

EL POPOLA ĈINIO
Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"
Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"
Direktoro: Hou Zhiping
Adreso: P.O.Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio
Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808

ENHAVO

- | | | | |
|----|--|----|--|
| 2 | INTER NI | 24 | Mondo de ŝtonkavernoj |
| 4 | EKONOMIE:
Internacia flughaveno de Pekino en pligrandigo; Pri Guizhou; Oni kune ĝuas feliĉan vivon | 28 | Moroj pri terno |
| 6 | JUNULARO:
El mia taglibro | 29 | LAŬ LA SILKA VOJO:
Ĉe Sayram-lago |
| 7 | KORESPONDI DEZIRAS | 36 | TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:
Pri ĉina kaligrafio |
| 8 | FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:
Nova problemo por Ĉinio — senlaboreco kaj reenoficiĝo | 38 | Skulptaĵo el taksusa ligno |
| 10 | ESP-NOVAĴOJ | 40 | Kiam ili plenkreskas... |
| 11 | POR KOMENCANTOJ:
Maljuna bovo | 42 | ORDINARAJ ĈINOJ:
Karboministoj |
| 12 | ORIGINALE VERKITAĴOJ:
Tata kaj Mama | 44 | EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 13 | Pri ses volumoj de "Elektitaj Verkoj de Vasilij Eroŝenko" | 46 | Pri la tibeta medicino |
| 15 | Disputi pri la suno; Kapti grandegan fiŝon (Antikvaj fabloj) | 48 | ĈINA KULTURO:
Antikva piedpilko |
| 16 | Kongreso cele al la 21-a jarcento | 50 | POR VIA SANO:
Sanprotekta gimnastiko |
| 21 | EN ĈINAJ URBETOJ:
En ponto-urbeto | 51 | ĈINAJ METIARTAJOJ:
Konka skulptaĵo |
| | | 2 | Turo en vespera krepusko |
| | | | SUR LA DORSKOVRILO:
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]
Baobaboj en Madagaskaro; En aŭtuno |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|--------------------|------------------------------|
| 1. Guizhou (p. 4) | 4. Changsha (p. 44) |
| 2. Luzhi (p. 21) | 5. Jingxian-gubernio (p. 44) |
| 3. Guangxi (p. 24) | |

Internacia flughaveno de Pekino en pligrandigo

de GUO JI

LA internacia flughaveno de Pekino konstruiĝis en 1955. Nun ĝi servas al 168 kursoj de 54 flugkompanioj je 1 131 flugfojoj semajne. Tio superas ĝian kapablon. Ekz. en 1996 la kvanto de pasaĝeroj akceptitaj de ĝi estis 16.38 milionoj, kio multe superis la difinitan kapablon de 3 milionoj jare.

En oktobro de 1995 ekis la pligrandigo de la internacia flughaveno de Pekino. La nova havendomo kun areo de 268 mil kvadrataj metroj staros tuj apud la malnova. Kune aperos 16

instalaĵoj, kiel aŭtoparka domo, aerodroma vartenejo kaj flug-kampo. Laŭplane oni povos utiliĝi ĉiujn tiujn de la 1-a de oktobro de 1999. Oni antaŭvidas, ke en la jaro 2005 la pasaĝertrafika kvanto de tiu flughaveno estos 35 milionoj, la flugkvanto estos 190 mil, la var-kaj poŝt-transporta kvanto estos 780 mil tunoj. La nova flughaveno havos la kapablon plenumi tiujn taskojn.

La nova havendomo en formo de "H", la plej granda en Ĉinio, estos 4-oble pli vasta ol la nuna. ■

Pri Guizhou

de ZHENG ZHENJIE



En la flughaveno Longdongbao en Guiyang

LA provinco Guizhou situas en sudokcidenta Ĉinio. Tie la naturaj kondiĉoj estas malfavoraj kaj oni vivis malfacile. Cirkulis popoldiro pri Guizhou: "Ne estas sinsekvaj tri sunaj tagoj, ne estas tri paŝoj da ebena loko, ne estas eĉ tri moneroj por ĉiu loĝanto." Ja tio estis fakto, sed ne ĉio estas senŝanĝa.

"Ne estas sinsekvaj tri sunaj tagoj" temas pri la multeco de pluvo en Guizhou. Multas pluvo, do valoras la suno. La ĉefurbo de Guizhou estas Guiyang, kiu en la ĉina lingvo signifas "valora suno". Sed pluvo donas ankaŭ malvarmeton. Subita pluvo en varma tago tre plaĉas al la popolanoj. Kiam oni suferas varmegon en aliaj urboj, en Guiyang oni eĉ portas du vestojn. En Guizhou, somero ne estas varmega kaj vintre ne prujnas, kaj la temperaturo ne multe ŝanĝiĝas tra la tuta jaro.

Ĝuste pro tia vetero, Guizhou ricevis la nomon "lando de mil akvofaloj", kaj en la tuta provinco troviĝas belaj montoj kaj riveroj, ĉarmaj lagoj kaj kavernoj.

Guizhou areo 176 mil kvadratajn kilometrojn, kies 97% estas montoj, kaj karsto konsistigas 73% de ili. Guizhou-anoj konstruis 4 ĉefajn fervojojn kaj ŝoseojn kun longo de 32 mil kilometroj ĝuste sur tia malebena tero. Ili eĉ konstruis novan flughavenon Longdongbao en Guiyang, por kio ili forigis 11 montetojn.

Guizhou havas multe da naturaj riĉfontoj. Pro multaj montoj la faldiferenco de riveroj estas granda. Per tio oni povas produkti elektron de 16.8 milionoj da kWh, kiu okupas la

6-an lokon en Ĉinio. En Guizhou estas karborezervo de 269.7 miliardoj da tunoj, kiom la totala karborezervo de 9 najbaraj provincoj. Tio montras, ke ankaŭ sude de Yangzi-rivero estas karbo, kaj multas bonkvalita karbo ĉefe en Guizhou. Guizhou havas fosforon kaj aluminion, kies rezervokvantoj okupas la duan lokon en Ĉinio, kaj kiuj famas pro la bona kvalito.

Guizhou estas riĉa ankaŭ je biologiaj riĉfontoj — 3 800 specioj de plantoj, ĉ. 1 000 specioj de bestoj, kiaj orhara simio, presbito, tigro de suda Ĉinio, kataĵo (*Cathaya argyrophylla*), davidio (*Davidia involucrata*) kaj aliaj raraj bestoj kaj plantoj, kiuj kreskas en montoj de Guizhou.

Pro naturaj kaj historiaj kialoj Guizhou ne estas forta en ekonomio, en iuj regionoj oni vivas malriĉe. Ekz. en la vilaĝo Laoyashan estas 23 familioj de mjaŭ-oj. Tie la malmultaj agroj dise kuŝas sur montdeklivoj, do ĉiuj familioj estis malriĉaj. Antaŭe radioricevilo estis la unika kaj plej valora aparato por la tuta vilaĝo.

En 1994, helpe de la loka registaro, la vilaĝanoj adiaŭis la monton kaj ekloĝis en nove konstruita vilaĝo, kie estas elektro kaj kranakvo kaj infanoj lernas en vilaĝa lernejo. Mjaŭa junulo Tang diris, ke antaŭe en la monto ili kulturis nur maizon, sed nun ankaŭ rizon. En 1996 la vilaĝanoj enspezis pli multe kaj ne plu havas ĉagrenon pri manĝaĵo kaj vestaĵo.

En Guizhou loĝas hanoj kaj nacimalplimulto, kiel mjaŭ-oj, buĵi-oj kaj dong-oj, kiuj ĉiuj diligente laboras kaj harmonie kunlaboras por pli feliĉa vivo.

Oni kune ĝuas feliĉan vivon

de JI PING

ĈE Bohai-marbordo estas la vilaĝo Qiansongjia kun belaj domoj kaj larĝaj stratoj. En infanĝardenoj kaj lernejoj ludas infanoj, en sportejoj kaj parkoj multas homoj. Jen la vilaĝo, kie oni kune ĝuas feliĉan vivon.

Vilaĝestro Song Zuowen diris al ni: “Tio estas konstruejo de tekstila fabriko, kie funkcios avangardaj instalaĵoj alilandaj, tio estos pligrandigata elektrejo de nia vilaĝo, tio estas fabriko de aluminaĵoj...”

Antaŭ dekkelkaj jaroj, la vilaĝo estis tre malriĉa. La vilaĝanoj unue fondis malgrandan fabrikon, kaj nun ĝia jara

vendovaloro estas 1.8 miliardoj da juanoj. Sed Song Zuowen trovis, ke en najbaraj vilaĝoj oni vivas malfacile, do li ekpensis pri kunlaboro inter la vilaĝoj por ke ĉiuj kune ĝuu la feliĉan vivon. Multaj aprobis lian ideon, kaj la kvar najbaraj vilaĝoj formis novan vilaĝon.

De tiam oni kune laboras sur pli vastaj kampoj, konstruis turisman lokon ĉe sovaĝa monto. La malriĉaj vilaĝoj ricevis helpon kaj oni enspezas pli multe. Kampano Ma diris: “Mi laboras en vilaĝa fabriko kaj enspezas pli multe kun pli diligentaj manoj.” ■



En lanŝpino de Qiansongjia-vilaĝo



Lü Junfeng

EL MIA TAGLIBRO

Junaj legantoj demandis min, ĉu ĉinaj junuloj devas fari militservon aŭ ne, kaj deziris informojn pri la vivo en la ĉina armeo. Mi prezentas pecojn el la taglibro de Lü Junfeng, 19-jara rekruto, kaj esperas, ke tio estos utila por ke niaj legantoj informiĝu pri la soldata vivo en Ĉinio. Lü aliĝis al armeo el la urbo Tonghua en nordorienta Ĉinio. Fininte la lernadon en supera mezlernejo, li laboris portempe kiel instalisto.

En Ĉinio, ĉiu, kiu atingas la aĝon de 18 jaroj, havas la devon militservi. Sed ne ĉiuj servis en armeo. Ekz. mi lernis en mezlernejo kaj universitato, poste eklaboris, kaj neniam spertis la soldatan vivon. Do lia taglibro estas tre interesa ankaŭ por mi.

Suno

13-a de decembro 1995

Hodiaŭ mi aliĝis al la armeo. En la veturanta trajno mi maltrankviliĝis. Kia estas la armeo? Ĉu pravas la vortoj de mia kunlernanto, ke en la armeo veteranoj molestas rekrutojn.

Sur la kajo oni bonvenigis nin per tamburado kaj gongado. La salutvortoj de vicdiviziestro donis

al mi multan konsolon.

Aŭtobusoj portis nin al la kazerno. La kaporalo tre amike traktis nin, kio diferencas de la informoj de miaj amikoj.

15-a de decembro

Jen mia unua leciono en armeo — ordigi litaĵon. En miaj manoj la litaĵo neniel fariĝis kuba, tamen la kaporalo tre lerte tion faris. Certe

li multe kaj diligente sin ekzercis. Tion mi devas lerni de li.

17-a de decembro

Mi ne leteris al mia kunlernanto, ĉar la fenomenojn, kiujn li rakontis, mi tute ne vidis, ekz. kaporalo, tre kruela, punas rekrutojn per malpermeso de manĝo, postulas donacojn de rekrutoj ktp.

Mi eksopiris pri la hejmo kaj

ŝtele telefonis al mia patrino. Nur 2-3 minutojn poste mi ĉesigis la telefonadon, ĉar mi timis, ke mi ne povos elteni la hejmsopiron.

La vespermanĝo — terpomo, brasiko ktp. ne plaĉas al mi. Mi prenis vaporumitan farunaĵon, aĉetis kolbason kaj ilin formanĝis.

22-a de decembro

Hieraŭ vespere Zhao suferis febron. La kaporalo metis siajn litaĵojn kaj surtuton sur Zhao, por ke li varmiĝu. Hodiaŭ matene, la kaporalo aĉetis fruktojn por li. La kaporalo estas afabla kiel frato.

25-a de decembro

Mi lavis vestaĵojn de la kaporalo sen lia scio. Sed poste li kritikis min anstataŭ laŭdi. Mi ne komprenas kial.

30-a de decembro

En 5-kilometra kurado mia maleolo tordiĝis. La kaporalo petis iun aĉeti medikamenton por mi. Post vespermanĝo li masaĝis mian maleolon. Panjo ofte diris, ke miaj piedoj fiodoras, sed la kaporalo tute ne abomenis tion.

5-a de januaro, 1996

Wang havas hodiaŭ datrevenon de sia naskiĝo. La kaporalo organizis celebran vesperon kaj preparis por li naskiĝtagan nudelon, kiu simbolas longvivecon. La gepatroj kaj parencoj de Wang certe sopiras pri li, kaj mi sentas, ke la kaporalo estas familiestro.

7-a de februaro

Neĝas. Jen la plej granda neĝo, kiun mi vidis. Tamen ni ne ĉesis ekzerci nin. Tuj venos la ekzameno. Ni devas diligente nin ekzerci.

14-a de februaro

Kun streĉeco mi trapasis la ekzamenojn kaj ricevis plej altan noton. Posttagmeze ni adiaŭis la rekrutan roton kaj venis al la ordinara. En la ĉambro mi trovis,

ke la veteranoj lasis plej bonan liton al mi.

16-a de februaro

Jen mia unua gardostaro. Mia deĵoro estas inter la 10a kaj 11a horo. Froste. Mi tremis eĉ en vatita surtuto. 40 minutojn post la 10-a, la kaporalo venis pli frue je 20 minutoj, por ke mi revenu min varmigi. Mi aŭdis, ke hieraŭ nokte li gardostaris anstataŭ iu.

18-a de februaro

Hodiaŭ estas antaŭvespero de la Printempa Festo. Ĉiuj sin preparas por la gaja festo. Vidante la belajn mur-ornaĵojn kaj abundajn menuojn por festeno, mi eksopiras pri la hejmo.

Antaŭtagmeze, la regimentestro kaj la politika komisaro venis kun festaj bondeziroj. Vespere, okazis amuza kunveno en nia roto. La edzino de la rotestro ludis kune kun ni.

19-a de februaro

Matene de la unua tago de la nova jaro laŭ la ĉina luna kalendaro, la rotestro venis kun bondeziroj, fruktoj kaj bombonoj. Ni ludis kartojn kaj ŝakon, kantis kaj dancis, ĉiuj tre ĝojis.

29-a de februaro

Posttagmeze mi ricevis poŝtaĵon senditan de miaj gepatroj. Estis bongustaĵoj. Ili ankoraŭ rigardas min kiel infanon manĝeman. Mi leteris al ili, ke ili ne plu sendu al mi manĝaĵojn.

7-a de marto

Letero de paĉjo diras, ke ĉe la pordo de nia hejmo oni pendiĝis tabulon kun vortoj "Honora militista familio", kaj najbaraj element-lernejanoj ofte venis purigi niajn ĉambrojn por montri sian respekton al nia familio.

Paĉjo diris, ke li tre ĝojas pro la honoro kaj deziras mesaĝon pri mia merito en la armeo.

Mi skribis al li: "Paĉjo, atendu tian ĝojigan informon."

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondkuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizaĵoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* S-ro Duan Yongxing, estro de la Muzika Lernejo Nie Er, deziras kontaktiĝi kun tutmondaj esperantistaj muzikistoj, precipe tiuj el Orienta Eŭropo. Adr.: 31, Xiba Xincun, CN-650031 Kunming, Yunnan, Ĉinio.

* Gilner Jaroslaw, 17-j., volas kor. kun juna japan(in)o. Adr.: ul. Piwna 2a/3, 44-100 Gliwice, Pollando.

* Julinha Zoraide Pereira dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adr.: Str. Costa, 159, 90.110 - 270 Palegre, Brazilo.

* Nikaragvaj e-istoj dez. kor. tm. pri diversaj temoj, speciale pri vivpunkto kaj filatelo. Adr.: Esperanto-Klubo de Nikaragvo, s-ro Eddy Silva Molina, Suc: ciudad Jardin, Apartado postal: T-67, Managua 12, Nikaragvo.

* Rakhmatullin Umid. Z, plenaĝa e-isto, volas revigligi korespondligojn tutmonde. Respondo garantiata. Adr.: Vinogradnaja 4, Samarkando, 703021 Uzbekistano.

* Ira kaj Jana, 14- kaj 12-jaraj fratinoj, dez. kor. kun samaĝuloj el tuta mondo. Adr.: Kizenko abon-kesto 1291, 354000 Soĉi, Rusio.

Nova problemo por Ĉinio – senlaboreco kaj reenoficiĝo

de JI PING



Reenoficigitaj virinoj trejnataj en tetrinkejo

DUM longa tempo Ĉinio fieris pri sia “manko de senlaboreco”, sed nun ĝi havas amason da senlaboruloj. La problemo nature fariĝis multe diskutata.

UNUJAJ SENLABORULOJ

Laborantoj de ĉinaj ŝtataj entreprenoj iris la vojon de facila dungigo, malaltaj salajroj kaj efiko.

Tiam 2-3 homoj faris laboron, kiun unu povis plenumi. La entreprenoj respondecis pri ĉiuj siaj laborantoj, escepte de ilia enkarcerigo. La entreprenoj ne eksigis sian laboranton, eĉ se ili malkontentis pri ties laboro. Tiam oni povis senkulpiĝi tion pro multaj kaŭzoj. Ĝi estas bona maniero por ke neniu estu malsata. Sed la sekvo de “malalta efiko” malutilis al progreso de la socia ekonomio.

Nun la ŝtataj entreprenoj suriris la vojon de merkata ekonomio, la situacio komplete ŝanĝiĝis. Se la entreprenoj malbone funkcias, ili bankrotos. Tial post kiam la entreprenoj havas rajton mem dungi kaj maldungi laborantojn, la supre menciita fenomeno estas ne plu vidata, kaj en la entreprenoj aperis multaj "superflujaj" laboruloj. Por malaltigi produktokoston la entreprenoj nepre devas maldungi ilin. Kvankam ili povas ricevi iom da subvencio, fakte ili senlaboriĝis.

Laŭ takso de koncerna departemento, ĝis la fino de la 20-a jarcento Ĉinio devas doni laboron al 220 milionoj da homoj, dum longa tempo ekzistos superflujaj laborfortoj.

PRI REENOFICIĜO

Vizaĝe al plimultiĝo de senlaboruloj, en 1994 Ĉinio ekpraktikis novan metodon de "reenoficiĝo", t.e. "inĝenierio de reenoficiĝo" en 30 urboj. Ekde 1995 ĝi estis praktikata en la tuta lando.

Ĝia ĉefa enhavo estas trejni senlaborulojn, kiuj estis en senlaboreco pli ol 6 monatojn, por alia okupo, kaj doni al ili subvencion.

He Guilan estis laboristino de prestinkturejo de Ŝanhajo. En sia 40-jara aĝo ŝi perdis laboron. Pro senlaboreco ŝia vivo multe ŝanĝiĝis. Ŝi ne sciis kion fari. Ŝia enspezo malmultiĝis, la vivo malfacilis. Tiam ŝi eniris en la servan centron por reenoficiĝo de Ŝanhajo. Tie ŝi studis kulinaran arton, fariĝis servistino de privata restoracio. Pro sia elstara laboro ŝi fariĝis ĉefservistino.

La vivovojo de He Guilan montras ke senlaboreco ne estas timiga, ĉar la socio helpas ŝin. En Ŝanhajo estas pli ol 100 tiaj servaj centroj, iliaj branĉoj kaj laborstacioj, kiuj trejnas senlaborulojn, donas al ili subvencion, faras socian asekuron por ili, liveras informojn de laborŝanco. Sole en la jaro 1996, en la centro studis 60 mil senlaboruloj, inter kiuj 20 mil havigis al si novan laboron.

La ĉina registaro donas specialan atenton al reenoficiĝo de senlaboruloj. Ĝi postulas ke la novaj establaĵoj nepre devas akcepti nombron da senlaboruloj. Diversaj kunvenoj por dungi laborantojn donas al ili ŝancon por denove labori. En la jaro 1996, Ĉinio havigis al 1.5 milionoj da homoj laboron. En Ĉinio la nombro de senlaboruloj konsistigas ĉ. 3% de la laborkapablaj urbanoj.

ŜANĜI KONCEPTON ESTAS ŜLOSILLO

Maldungite de ŝtata entrepreno, Wu Jindi ne trovis taŭgan okupon, pro tio ŝi ege ĉagreniĝis. En 1993 oni proponis ke ŝi laboru kiel horpaga vartistino. Aŭdinte tion, Wu Jindi multe pensis. Ŝi naskiĝis en intelektula familio. Ĉiuj ŝiaj parencoj

kaj amikoj estas diplomitiĝintaj el supera lernejo, kaj se ŝi laboros kiel servistino, ŝi perdos la vizaĝon. Se ne, kiel ŝi vivos? Ŝi pensis kaj pensadis. Fine ŝi ŝanĝis la ideon, malgraŭ ke la ŝanĝiĝo estis malagraba. Wu Jindi laboris kiel vartistino en pluraj hejmoj, inkluzive de tiuj de eksterlandanoj. Iam ŝi laboris unutage en 5 hejmoj. Per sia diligenteco ŝi kontentigis la dungintojn.

Nun Wu Jindi kun ĝojo laboras kiel servistino. Ŝi komprenis, ke por bone labori ŝi devas scii multe. Por tio ŝi vizitis kursojn de "etiketoj" kaj "kulinara arto". Kiam ŝi servis en iu germana familio, ŝi lernis iom da germanaj vortoj. En kelkaj jaroj ŝi faris "taglibron por familia servo" kaj planas verki libron.

Sed ne ĉiu povas ŝanĝi koncepton tiel rapide kiel Wu Jindi, tial por multaj senlaboruloj, trovi novan laboron estas malfacile solvebla problemo.

En Harbin, urbo de nordorienta Ĉinio, iu kompanio bezonis 50 konstruistojn kaj por tio la senlaboruloj ĝuas prioritaton. Sed neniu tion petis. Fakte la tieaj registritaj senlaboruloj atingis 15 mil, inter kiuj nur malmultaj kolportas, kaj la aliaj ankoraŭ serĉas laboron.

Kial senlaboruloj ne petis la okupon? Tion decidis ilia malnova koncepto. Ekz. iuj laboris en ŝtataj entreprenoj dekelkajn aŭ eĉ kelkdek jarojn, ili havas "senton de supereco", kaj malestimas la laboron en privataj entreprenoj. Kaj pro malfacilaĵo ili ne volas vendi manĝaĵojn nek legomojn. Iuj ofte komparas la trovitan laboron kun sia antaŭa, volas laboron puran, malpezan kaj pli enspezigan, eĉ distanco inter la laborloko kaj hejmo estas unu el la kondiĉoj. Tia laboro, kompreneble, estas tre malmulta.

Alie, antaŭjuĝo de la socio donas malfacilon al reenoficiĝo. En la okuloj de multaj homoj, tiu, kiu perdis laboron, certe estis maldiligenta. Kaj plie, ĝenerale dirite, ili estas pli aĝaj, tial oni ne volas akcepti ilin.

Kompreneble, iuj dungantoj havas alian opinion. La Ŝanhaja Aviad-kompanio rompita la antaŭjuĝon kaj akceptis nombron da mezaĝaj virinoj kiel stevardinojn. La kompanio opiniis ke mezaĝulinoj estas pli komprenemaj, pli mildaj, kaj havas sian propran ĉarmon. Iu granda ĉenbutiko en Pekino havas la saman opinion kaj akceptis multe da mezaĝulinoj. Tio multe kuraĝigas tiujn, kiuj ĉagreniĝas pro senlaboreco. Sed fakte la similaj entreprenoj estas malmultaj, plejmulte da senlaboruloj ne povas ĝui tian favoron. Se ili dum longa tempo ne laboras kaj ne volas ŝanĝi sian koncepton, ili dronos en la situacio de malfacilo. ■

ĈINIO

● La kunveno de interŝanĝo de spertoj pri amikiĝo per Esperanto kun aliaj landoj, kiun gvidis la Ningbo-a Esperanto-Asocio, okazis en la fino de majo en Ningbo, Zhejiang(Ĝeĝjang)-provinco. Pli ol 20 esperantistoj el diversaj lokoj de Ĉinio interŝanĝis spertojn. La partoprenantoj vizitis vidindajn lokojn kaj muzeon de insektoj, portantan la nomon de prof. Io Chou, fama ĉina entomologo kaj esperantisto. (Bao Shujun)

● Jinda, la unua restoracio en Gansu-provinco, kiu uzas Esperanton, ekfunkciis en ĝia ĉefurbo Lanzhou en la fino de marto. Sur la lintelo de la luksa restoracio estas latunaj verda stelo kaj Esperantaj vortoj “Bonvenon, Esperantaj amikoj”. Lu Xiaohong, direktoro de la restoracio, esprimis, ke li instigos la laborantojn lerni Esperanton por ke ili pli bone servu al esperantistoj.

IRANO

● En la 18-a de junio 1997 okazis plej nova E-kurso en plej grava kaj granda ŝtata universitato “Shahid Beheshti”, en la ĉefurbo Teherano. En tiu kurso partoprenis ĉirkaŭ 30 gestudentoj, kaj ĝin gvidis pionira e-isto prof. M.H. Saheb-zamani, honora membro de UEA kaj ILEI (Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj). Antaŭ kelkaj jaroj li gvidis E-kurson por geprofesoroj de la sama universitato. Krome, nun li gvidas ankaŭ aliajn E-kursojn por komencantoj kaj mezgradan. (Mojtaba Kheirkhah)



Prof. M. H. Saheb-zamani instruas Esperanton.

KROATIO

● La Unua Kongreso de Kroataj Esperantistoj okazis en junio 1997 en Zagreb. Kvankam jam pasis kelkaj monatoj post la evento, la sekvojn de la kongreso daŭre ĝuas la tuta internacia Esperanto-komunumo, ne nur 200 partoprenintoj, kiuj ĉeestis la kongreson. La poŝtmarko de la



En la Unua Kongreso de Kroataj Esperantistoj

kroata poŝto kun la portreto de Zamenhof, dediĉita al la kongreso, daŭre cirkulas tra la mondo. Kroatio estas la sola lando en la mondo, kie en publika loko eblas pagi per “Esperanta monero”. Temas pri la monero de 25 kunaĵoj kun la simbolo de la Unua Kongreso de Kroataj Esperantistoj. (Kroatia Esperanto-Ligo)

POLLANDO

● XI-aj Esperantaj Tagoj de Staszow okazis inter la 30-a de majo kaj la 3-a de junio 1997. Ĝin partoprenis 44 personoj kun gastoj el Danio, Italio kaj Germanio. (Klub Esperanto)



Partoprenantoj de la XI-aj Esperantaj Tagoj de Staszow



MULTAJ aferoj de mia hejmloko ĉiam restas en mia memoro; precipe nia skeleta maljuna bovo estas neforgesebla.

Multajn jarojn ĝi laboradis senlace kaj senplende. Poste ĝi maljuniĝis kaj malfortiĝis. Mia patro vidis ĝian kreskadon de bovido al bovo kaj sciis ke ĝi laboris dum la tuta vivo. Li do ne plu donis laboron al ĝi, por ke ĝi feliĉe pasigu siajn lastajn jarojn.

En nia vilaĝo ĝi estis la plej alta bovo kun longaj kaj dikaj kornoj.

Ĝi ofte kuŝis antaŭ grenejo. Mi kaj miaj kamaradoj ĉirkaŭis kaj karesis ĝin, kombis ĝiajn harojn, manĝigis al ĝi furaĝon. Ĉiufoje ĝi kun larĝe malfermitaj okuloj milde rigardis nin. Ĝia rigardo estis tiel trankvila, tiel milda, ŝajne ĝi havis multajn vortojn por diri al ni.

Ĉiumatene leviĝinte, la bovo forskuis de si la pajlon, eliris el la stalo kaj sin direktis al bordo de rivero por trinki. Ĝi iris tre malrapide kaj aspektis serena. Ĝia maldika ventro, ĝiaj belaj kornoj, ĝiaj puraj haroj kaj ĝia granda skeleta korpo formis ĝian solidan belecon.

Ĉe la rivero, ĝi trinkis iom da akvo, malrapide revenis al la stalo. Kiam la suno estis subironta, ĝi laŭ kutimo eliris por trinki akvon kaj revenis. Ĝia mallonga promenado estis tiel akurata, ke oni rigardis ĝin kiel horloĝon.

Kiam ĝi aŭdis la voĉon de juna paŝtisto, ĝi tuj eliris el la stalo, staris sur la herbejo kaj rigardis la verdan paŝtejon. Post momento ĝi rigardis foren al la tritika kampo, kie ĝi laboris, kiam ĝi estis juna. Kun sopira mieno, ĝi rigardis la kampon, kvazaŭ

maljunulo memorus pasintaĵon.

Poste la bovo malsaniĝis. Ĝi malfortiĝis tagon post tago, tremis serioze, ĝiaj haroj stariĝis. En ĝiaj senfortaj okuloj ni vidis suferon. Ni invitis veterinaron. Li atente diagnozis ĝin kaj metis iom da nigra kuraca pulvoro apud ĝian nazon, ke ĝi ensorbu la pulvoron.

La bovo kuŝis kelkajn tagojn. Ĝi estis tiel malforta, ke ĝi eĉ ne havis forton por rigardi manĝaĵon kaj akvon. Poste ĝi povis manĝi, sed ne stabile stari.

Iutage la bovo aspektis iom pli vigla. Ni estis ĝojaj. Ni faris girlandon kaj pendigis ĝin sur ĝia kolo. Ni karesis ĝin, kaj ĝiaj okuloj brilis.

Ĝi stariĝis kaj malrapide eliris el la pordo. Ni sekvis ĝin.

Atinginte la riveron, ĝi trinkis iom da akvo kaj restis senmova por momento. Anstataŭ reveni al la stalo,

ĝi iris al la kampo. Tie milda vento karesis maturiĝantan tritikon. Sennombraj papilioj flugis super la tritiko. La bovo staris apud la kampo, kviete rigardis ĝin kiel konaton. Abrupte ĝi skuiĝis, ĝemis kaj falis. Ni ektimis, kriis, kuris hejmen por raporti.

Kiam plenkreskuloj venis, la bovo jam perdis la konscion.


La bovo, kiu multe laboris kaj ĉiam silentis, fine mortis. Ni enterigis ĝin apud la kampo, kie ĝi laboris kaj ripozis. Ĉiun printempon floras belaj floroj sur ĝia tombo.

Nun ĉiufoje, kiam mi revenis hejmen, mi ne forgesis viziti ĝian tombon. ■

MALJUNA BOVO

Tata kaj Mama

de KIZEYIDIOKO-MAYINDA*
(Demokratia Respubliko de Kongolo)



La aŭtoro

EN la vilaĝo Songa-Lumueno vivis geedzoj, la edzo Tata kaj la edzino Mama. Nenio malpacigis ilian hejmomastumadon komence de ilia geedziĝo. La geedzoj amegis sin reciproke. Iam la edzino ne plu bone prizorgis sian edzon. Tata aliĝis. Li ekadulis kun aliaj vilaĝanoj, kiuj tutkomplete ĉiamaniere satigis lin. Mama ofendiĝis pro la konduto de sia edzo. Ŝi petis konsilon de najbarino. “Kara amikino,” ŝi diris, “kion mi devas fari por revenigi mian edzon? Li ne plu amas min kaj de la lastaj tagoj li tranoktas for de nia geedza tegmento.” La najbarino Mansanga respondis al ŝi: “La solvo estas facila. Iru al la sorĉisto, kiu loĝas en la vilaĝo Kvalundua. Li pozitive solvos vian problemon.”

Mama sekvis la konsilon de sia amikino. Ŝi renkontis la sorĉiston por havi eventualan solvon. Ŝi klarigis al li la aferon. Post atenta aŭskultado la sorĉisto diris: “Filino mia, via problemo estas

facila, mi solvos ĝin pozitive kiel vi deziras, vi nenion pagos, mi nur volas ke vi alportu al mi harojn de virleono.” “Ho!” kriis Mama. “Kiamaniere mi havos tion?” ŝi diris al la sorĉisto.

“Ĉion faru por ke via problemo trovu kontentigan solvon.” Mama malĝoje revenis hejmen. Ŝi multe pensis kaj pensadis dum la nokto kaj fine ŝi havis ideon. Frumatene ŝi eliris el la domo kaj sin direktis al arbarego, kunportante grasan vivantan ŝafidon, kiun ŝi donis al leono. Ŝi ĉiutage kunportadis grasan vivantan ŝafidon al la sama leono en la sama arbarego. Finfine ili amikiĝis. Antaŭe Mama de malproksime ĵetadis la ŝafidojn al la leono. Sed iam, kiam ŝi atingis la lokon, la leono afable movis sian voston por revenigi sian amikino. Mama ne plu timis. Ŝi alproksimiĝis al la leono kaj donis al ĝi la ŝafidon. Post manĝado Mama karesis la leonon, kiu profunde dormis pro mildaj kaj dolĉaj karesoj de Mama.

Profitis la okazon, Mama forprenis iom da haroj kaj tuj foriris al la sorĉisto. “Jen la de vi bezonataj haroj.” La sorĉisto ne kredis al siaj okuloj: “Ĉu vere vi alportas al mi virleonajn harojn? Kion vi faris por ilin havi?” Mama detale klarigis kion ŝi faris. Post longa pripensado la sorĉisto diris al ŝi: “Kara filino, mi scias, ke vi senpacience atendas la solvon de via problemo. Jen mi diras al vi kion vi devas fari. Reiru al via edzo kaj faru al li tion, kion vi faris al la leono. Vi pravigos min.”

Mama sekvis la konsilon de la sorĉisto kaj la rezulto estis ege pozitiva. Tata revenis hejmen kaj ekde tiam granda harmonio regis inter ili. Ilia amo pligrandiĝis. ■

*La aŭtoro estas esperantisto-instruisto en la klubo Verda Flago de Mbanza-Mgungu, administra konsilanto de Zairia Esperanta Junulara Organizo. Diplomita pri latino kaj filozofio. Naskita en 1968.

V. Eroŝenko

Cikatro de Amo



tradukitaj
de
SHI Chengtai
kaj Guozhu

kompilita
de
MINE Yositaka

BLINDA rusa verkisto kaj poeto V. Eroŝenko estis ŝatata en Ĉinio en la 20-30-aj jaroj, kaj ankaŭ en Japanio antaŭ la Dua Mondmilito. Tamen li ne estis fekunda poeto. Li gajnis multe da legantoj en la Oriento per siaj fabeloj kaj prozaĵoj plenaj de revoj. Rekomendite de Lusin, granda ĉina verkisto, li instruis en la Pekina Universitato. Lusin kaj Hujucz, pioniro de la ĉina Esperanto-movado, ĉinigis liajn verkojn. Dank' al tio, multaj ĉinoj bone konis lin kaj liajn verkojn antaŭ la Liberiĝo de Ĉinio en 1949.

Multaj el liaj verkoj estis kreitaj en la japana lingvo kaj malmultaj en Esperanto. En siaj lastaj jaroj li verkis en Esperanto-brajlo kaj poste oni esperantigis la verkojn. Mi ne scias, ĉu li verkis en la rusa, lia patrino lingvo. Verŝajne jes. Meze de la 20-aj jaroj li revenis al la soveta Rusio. Eĉ se li verkis en la rusa lingvo, ne eblus eldoni lian verkon siatempe.

“Plena Verkaro de V. Eroŝenko” el tri volumoj, kompilita de japana s-ano Katasugi Itiro, eldoniĝis japanlingve en 1959. Ankaŭ “Verkaro de V. Eroŝenko” el du volumoj estis kompilita de li kaj eldoniĝis en 1974. En 1973 mi vizitis lin en Tokio. Mi informiĝis, ke eldoniĝis japanlingve “Plena Verkaro de V.

Eroŝenko” kaj ĉinlingve liaj kelke da verkoj dank' al Lusin, kvankam ne en formo de plena verkaro aŭ elektitaj verkoj. Tiam ni bedaŭris mankon de Esperanta eldono de verkaro de Eroŝenko.

Aŭguste de 1979, dank' al klopodoj de japana aktivulo Mine Yositaka kaj kunlaboro de fama esperantisto Miyamoto Masao de la Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj, eldoniĝis Esperante “Lumo kaj Ombro”, la unua volumo de “Elektitaj Verkoj de Vasiliĵ Eroŝenko”. Plejparto de la artikoloj en ĝi estas prozaĵoj kaj fabeloj, kiujn li verkis Esperante dum sia restado en Ĉinio kaj en

lingvo. Lusin ĉinigis unu el ĝi. La 25-an de junio 1921 Akita Uĵaku (1883-1962) donis antaŭparolon al la fabelaro. Tio okazis antaŭ ol Eroŝenko estis forpelita el Japanio. La lasta alineo de tiu mallonga antaŭparolo tekstas:

“La homoj havis, havas kaj havos sennombrajn belajn sonĝojn, kvankam en mizero kaj malĝojo. Viaj dekelkaj sonĝoj en la verko multe pli spronas nin ol nia longa interparolo kun vi. Kara Eroŝenko, kie ajn vi estos, neniam forgesu viajn sonĝojn.”

La vortoj estas same kortuŝaj kiel la lasta alineo de la antaŭparolo

CHEN YUAN*:

Pri ses volumoj de “Elektitaj Verkoj de Vasiliĵ Eroŝenko”

kiuj ne forgesblas por ĉinaj legantoj la verkoj “Rakontoj de Velkinta Folio” kaj “Turo por Fali”.

“Elektitaj Verkoj de Vasiliĵ Eroŝenko” (Vol. 2) sub la titolo “La Tundro Ĝemas” eldoniĝis en 1980. Ĝi ampleksas liajn verkojn skribitajn en Esperanto en 1929-1930, kiam li vivis en Siberio kun ĉukĉoj. Inter ili “La Trimova Ŝakproblemo” estas raportaĵo animskua. Malfacile imageblas, ke ĝi travivis la tiaman politikan movadon.

“Elektitaj Verkoj de Vasiliĵ Eroŝenko” (Vol. 3) sub la titolo “Malvasta Kaĝo” estis eljapanigita de s-ro Miyamoto Masao kaj eldonita en 1981. La volumo ampleksas la unuan fabelaron “Kanto antaŭ la Tagiĝo” de Eroŝenko eldonitan en la japana

lo farita de Akita Uĵaku post duonjaro por la fabela dramo “Persikokolora Nubo” de Eroŝenko. Ĝi tekstas:

“Vi kriis: ‘Ne malesperu, ĉar printempo estas tio, kio neniam malaperos.’ Jes, printempo neniam malaperos.”

“Elektitaj Verkoj de Vasiliĵ Eroŝenko” (Vol. 4) sub la titolo “Stranga Kato” ampleksas ses fabelojn japanlingve verkitajn kaj aliajn du Esperantajn prelegojn, kiujn publikigis Eroŝenko nelonge post sia alveno al Japanio en 1916. Unu el ili portas la titolon “Nun Estas Tempo por Semi sed Ne por Rikolti”. Ĝi elspiras entuziasmon, revon kaj idealon de Eroŝenko. Li diris: “Jes, ni laboras por la estonteco, ni laboras por la posteuloj. Ni nun ĝeneraldire nenion

profitas... Nun estas bezonataj ne parolantoj sed agantoj, ne dormantoj sed maldormantoj, ĉar nun estas tempo ne por ripozi sed por batali, ne por preni sed por donaci, ne por kolekti sed por oferi.” Tio estas nenio alia ol vortoj plenaj de revoj. Kiel diris granda filozofo, revoj estas ĉiam bezonataj de la homoj. Sen revoj ne estus la bela perspektivo de la mondo.

“Elektitaj Verkoj de Vasilij Eroŝenko” (Vol. 5) sub la titolo “La Kruĉo da Saĝeco” enhavas popolrakontojn hindan, afrikan, korean kaj turkmenan, kiujn Eroŝenko verkis Esperante en 1952, kelkajn monatojn antaŭ lia morto en Turkmenio. 30 jarojn poste, oni trovis ilin en personaj dosieroj de Zinaida I. Ŝamina, blinda instruistino pri muziko. La popolrakontoj estis verkitaj ekskluzive por distri ŝin. En Moskvo Eroŝenko amikiĝis kun ŝi. Poste li fiksloĝis en Turkmenio kaj petis ŝin helpi lin en funkciigo de blindula lernejo proksime de lia loĝejo.

La kvara volumo eldoniĝis en 1983 kaj la kvina en 1995. Kaj en 1996 aperis la sesa kun la fabeloj “La Tragedio de Kokido”, “Ave-to de l’Tempo”, “Cikatro de Amo” kaj “Ruĝa Floro”. Ĉiuj tiuj fabeloj estis esperantigitaj de ĉinaj s-anoj Shi Chengtai kaj Guozhu.

Aparte menciindas, ke la sesa volumo konsistas ĉefe el la lastaj fabeloj de la poeto. Mi jam ricevis la libron senditan de la tradukintoj kaj poste la kvinan volumon senditan de s-ro Mine Yositaka, kompilinto de “Elektitaj Verkoj de Vasilij Eroŝenko”. Releginte la tradukojn de Lusin kaj Hujucz, mi havis multon por diri. Mi do unue koncize prezentas en ĉi artikolo ĉiujn ses volumojn de la verkoj.

Oni diris, ke en la hejmlando de la poeto aperis liaj elektitaj verkoj en la rusa lingvo. Li revenis al la patrolando en 1923 kaj mortis en 1952. Kaj lia persona renomo estas diskonigita de liaj samlandanoj 40 jarojn post lia

morto.

Vere, kun ŝtono fajro neniam malaperos kaj printempo finfine venos. ■

La oka konkurso de EPĈ-legado

Por la ĉi-foja konkurso ni starigis 10 demandojn. Por ĝuste respondi la demandojn, legu la koncernajn artikolojn de EPĈ, 1997. Ni petas vin respondi per viaj propraj vortoj klaraj kaj koncizaj.

Skribu la n-rojn de la demandoj kaj viajn respondojn sur papero kaj sendu ĝin antaŭ la 31-a de januaro 1998 al s-ro Wang Hanping, El Popola Ĉinio, P.O.Kesto 77. Pekino, CN-100037 Ĉinio. Viaj proponoj kaj sugestoj estas bonvenaj.

La gajnintoj de la konkurso ricevos ĉinan metiartaĵon aŭ libron eldonitan de la Ĉina Esperanto-Eldonejo.

La demandoj estas jene:

1. Laŭ la ĉina luna kalendaro, la jaro 1996 estas Jaro de Muso. Kiu jaro do estas 1997?
2. Kiu nacimalplimulta regiono estas la plej frue starigita aŭtonoma regiono de Ĉinio?
3. Kiu dato estas la Ĉina Junulara Tago? Kiel ĝi devenas?
4. Laŭ ĉina tradicio, orkideo kaj aliaj tri plantoj simbolas diversajn karakterojn, kaj oni nomas ilin “4 nobluloj”. Ĉu vi povas eldiri la nomojn de la aliaj tri plantoj?
5. Ĉinaj nacimalplimultoj havas tri epopeojn. Ĉu vi povas eldiri la titolojn de tiuj tri epopeoj? Ĉu vi scias, al kiuj nacimalplimultoj apartenas tiuj tri epopeoj?
6. Eldiru kelkajn nomojn de ĉinaj filmoj, reĝisoroj kaj aktoroj.
7. Antaŭe en Ĉinio estis tri municipoj, t.e. Pekino, Ŝanhajo kaj Tianjin. Lastjare la kvara estis starigita. Kiu ĝi estas?
8. En 1997 ni prezentis tiun parton de la Silka Vojo, kiu etendiĝas de Gansu-provinco, tra la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, ĝis la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono. Kio pri ĝi plej profunde impresas vin? Kial?
9. Bonvolu eldiri la novajn rubrikojn de 1997. Kiujn novajn informojn ili donis al vi?
10. Kie vi ricevis la informojn pri la reveno de Hongkong al Ĉinio? Kiel vi pensas pri la estonteco de Hongkong?

* Fama ĉina lingvisto kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA.

Disputi pri la suno

Foje Konfuceo* vidis dum sia vojaĝo du knabojn disputi. Li demandis pri la kaŭzo. Unu knabo diris: "Mi opinias ke la suno matene estas pli proksima al ni ol tagmeze." La alia havis malan opinion.


La unua diris: "La ĵus leviĝinta suno estas granda kiel ombrelo kaj tagmeze malgranda kiel telero. Ĉu tio ne signifas ke ĝi estas proksima matene kaj malproksima tagmeze?"

Sed la dua diris: "Matene estas malvarmete kaj tagmeze varme. Ĉu tio ne signifas ke ĝi estas

malproksima matene kaj proksima tagmeze?"

Konfuceo ne povis konkludi, kiu el ili estas prava. Tial la du knaboj mokis lin: "Kio pravas, ke vi havas multajn sciojn?" ■

* Konfuceo estis granda ĉina edukisto kaj pensulo antaŭ pli ol 2 000 jaroj. La fabelo montras al ni la virton "Konfesu tion, kion vi scias, kaj konfesu ankaŭ tion, kion vi ne scias."



Kapti grandegan fiŝon

Zisi, antikva filozofo, loĝis en Wei-regno. Iu lokano fiŝis ĉe la bordo de la Flava Rivero. Li kaptis grandegan fiŝon, kiu plene okupis ĉaron. Zisi demandis lin: "Tia fiŝo estas malfacile kaptebla, kiel vi sukcesis kapti ĝin?" Tiu ĉi respondis: "Komence mi uzis fiŝeton kiel logaĵon, la grandega fiŝo nur

preternaĝis, eĉ ne ĵetis rigardon al ĝi; poste mi uzis porkidon, kaj la fiŝo englutis la porkidon."

Zisi veis: "Kvankam kapti grandegan fiŝon estas malfacile, tamen ĝi perdis la vivon pro avideco; kvankam intelektuloj scias multe, tamen ricevas mortpunon pro avideco je mono." ■

Kongreso cele al la 21-a jarcento



Teksto de EPĈ-raportisto Fotoj de HOU ZHIPING

LA 82-a Universala Kongreso de Esperanto okazis inter la 19-a kaj 26-a de julio en la Konferenca Centro de Adelajdo, ĉefurbo de Sud-Aŭstralio. Kongresis ĉirkaŭ 1 000 esperantistoj el 57 landoj. Ankaŭ la Ĉina Esperanto-Delegacio el ses membroj ĝuis la kongresan semajnon. Ili ne nur spertis neordinarecon de la kongreso, sed ankaŭ havis la panoraman vidon de la arta urbo.

ATENTATA SALUTMESAĜO DE ĜENERALA SEKRETARIO DE UN

Antaŭtagmeze de la 20-a de julio estis malfermita la kongreso en prezentado de aŭstraliaj aborigenoj. S-ro Kofi Annan, ĝenerala sekretario de UN, mesaĝe gratulis la kongreson. Li akcentis la rolon de lingvo en la interkomunikado kaj interkompreniĝo de la homoj kaj dankis UEA pro ĝia laborado por antaŭenigi lingvon kiel rimedon por kunigi la homojn. Li montris, ke UEA laboras konforme al la celo de UN tiuflanke kaj UN depend-

as de multaj neregistaraj organizoj laborantaj kune kun ĝi, kaj esperis, ke ĉiuj kongresanoj helpos enfokusigi la atenton en strebado por certigi la vivon de digneco por la homoj. Lia salutmesaĝo estis varme aplaŭdata, kio montris la esperon de la homaro sur UN. La kongreson mesaĝe salutis ankaŭ ĝenerala direktoro de Unesko.

La aŭstralia registaro alte taksis la kongreson. La ĝenerala gubernatoro Kavaliro William Deane funkciis kiel alta protektanto de la kongreso. En sia salutmesaĝo al la kongreso li diris: “Nome de la popolo de Aŭstralio mi bonvenigas en nian landon la mondkongreson de parolantoj kaj uzantoj de la internacia lingvo Esperanto. La graveco de komuna lingvo por konservi unuecon kaj harmonion en iu ajn multkultura socio, en kiu oni estimas etnan diversecon, estas ĝenerale akceptata... Mi deziras ĉion bonan al la esperantistoj en iliaj klopodoj pliiigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto, ne nur en ĝia propedeŭtika funkcio, sed ankaŭ en ĝia uzo kiel dua lingvo aŭ helpolingvo en la tutmonda komunika-

do.” Mesaĝe salutis la kongreson ankaŭ la aŭstralia ministro pri eksterlandaj aferoj kaj la ministro pri enmigrado kaj plurkulturo.

GRANDA INTERESO PRI KONFUCEANISMO

Konfuceo estis granda pensulo, politikisto kaj edukisto en la antikva Ĉinio. Konfuceanismo kreita de li antaŭ 2 500 jaroj ludis gravan rolon en la historio kaj kulturo de Ĉinio kaj havis gravan influon ankaŭ sur la ideologio kaj kulturo de aziaj landoj. La 22-an de julio profesoro Kong Xianglin (Kong Ŝjanglin), membro de la ĉina delegacio kaj 75a-generacia posteulo de Konfuceo, prelegis sub la titolo “Kiun rolon ludas konfuceanismo en la moderna socio”. La prelego temas pri la influo de filozofio, etiko, politiko kaj edukado de Konfuceo sur la moderna socio. Prof. Kong Xianglin montris, ke la kongresa temo “Toleremo kaj justeco en multkultura socio” havas ion komunan kun konfuceanismo. Konfuceo proponis, ke diversaj akademiaj skoloj, kaj ankaŭ la homoj, devas

lerni unu de alia. Li pledis por harmonia kunvivado de diversaj nacioj kaj por plena malegoismo en la mondo. La prelego vekis grandan intereson ĉe la aŭskultantoj. Iuj demandis pri la rilatoj inter konfuceanismo kaj religio, aliaj petis koncernan materialon, triaj volis aĉeti videobendon pri la loĝejo kaj tombejo de Konfuceo kaj kvaraj aĉetis la libron "Analektoj de Konfuceo" eldonitan de la Ĉina Esperanto-Eldonejo.

Interese, prof. Lee Chong-Yeong, prezidanto de UEA, prelegis en IKU sub la titolo "Ekonomiko de Konfuceo". Li diris: "Ekonomio progresas ne nur per ekonomiaj kaj raciaj faktoroj, sed ankaŭ per kombina influo de kulturaj kaj sociaj faktoroj. Ekonomio en la konfuceanismo influitaj aziaj landoj progresis surbaze de 'afekciismo', kiu postulas lojalecon al familio aŭ grupo... La rapide internaciiganta nuntempa monda ekonomio indikas, ke por ekonomia evoluo ni bezonas ne nur 'ekonomian kapitalon', sed ankaŭ 'socian kapitalon' de humaneco kaj fido."

Laŭ peto, prof. Kong Xianglin konigis konfuceanismon ankaŭ al ĉinlingvaj lernantoj de Adelajdo-mezlernejo, kiu havas 11 ĉinlingvajn kursojn kun pli ol 300 lernantoj. Ni estis informitaj, ke 25 elementaj lernejoj kaj 17 mezlernejoj en Sud-Aŭstralio instruas la ĉinan lingvon.

EPĈ-KUNSIDO KUN AFABLAJ PARTOPRENANTOJ

Antaŭtagmeze de la 22-a de julio okazis kunsido de EPĈ-legantoj. Ĝin ĉeestis niaj peran-

toj, legantoj kaj ankaŭ eminentuloj en Esperantujo, kiaj prof. Lee Chong-Yeong, s-ino Spomenka Štimec kaj s-ro Yosikazu Takeuti. Laŭ ili, nia revuo fariĝas pli internacia, pli bela kaj pli enhavoriĉa kun pli da mallongaj artikoloj. Multaj el niaj legantoj zorgas pri la financa malfacilo de nia redakcio. Nia germana leganto s-ro Heinz Schindler donacis 1 000 germanajn markojn al la Fondaĵo EPĈ-abono kaj pagis trijaran abonkotizon. Krome, li pagis kvarjaran abonkotizon ankaŭ por du ĉinaj s-aninoj.

Germana kaj franca legantoj proponis, ke ni aperigu humuraĵojn, karikaturojn, amuzojn kaj anekdotojn por malstreĉi



Prof. Kong Xianglin (meze)

legadon. Nia germana leganto s-ro Rudolf Skoruppa esperis, ke ni pli bone funkciigos la rubrikon "Fotofaritaj de E-istoj" por havigi al la revuo pli da internaciaj aspektoj.

"KAMPANJO 2000" SPRONA

La homaro estas enironta la novan jarcenton. Kio estos la celo de la monda E-movado? Per kio ni kontribuu al ĝi? Tio estas vaste atentata en la Esperanto-komunumo. Por starigi novan internacian lingvan ordon estis proponita laborplano por 1997-2000. Dum la kongreso la Komitato de UEA kaj kon-

cernaj laborgrupoj diskutis pri ĝi.

La planon konsistigas la organizaj aranĝoj por la Kampanjo 2000; levado de organiza kaj idea niveloj de la Esperanto-komunumo per lernado kaj instruado de Esperanto, 90-jara jubileo de UEA, konservo de fierinda kultura heredaĵo kaj pligrandigo de membraro de UEA, fakaj kaj landaj asocioj; levado de la prestiĝo de Esperanto kaj plibonigo de Esperanto-amaskomunikiloj; mobilizado de diverslandaj influemaj personoj al "Amiko de Esperanto" internacia aŭ nacia; plifortigo de la rilatoj kun UN, Unesko, neregistaraj organizoj kaj Eŭropa Komunumo, disvastigo de Esperanto inter ili kaj influado sur

la internacia vivo. La kongreso aprobis rezolucion pri tiu temo.

Inspirate de la laborplano, reprezentantoj de aziaj, eŭropaj kaj amerikaj esperantistoj interŝanĝis opiniojn pri la estanteco kaj estonteco de la E-movado en siaj propraj kontinentoj. La kongresanoj el Eŭropo, Ameriko kaj Oceanio montris grandan intereson pri la E-movado en Azio. Prof. Wei Yuanshu, prezidanto de la Ŝanhaja

Esperanto-Asocio, raportis pri la disvolviĝo de la E-movado en Ĉinio post la Unua Azia Kongreso de Esperanto okazinta en Ŝanhajo aŭguste de 1996. Ankaŭ reprezentantoj el Japanio, Koreio, Vjetnamio kaj Nepalo raportis pri sialanda E-movado. Estis decidite, ke la Dua Azia Kongreso de Esperanto okazos en Vjetnamio en 1999.

Dank' al la aŭspicioj de la gastiganta lando kaj perfekta laboro de la Aŭstralio Esperanto-Ligo, la kongreso estis finita per plena sukceso. Tio helpas ne nur al la E-movado de Aŭstralio, sed ankaŭ al efektivigo de la Kampanjo 2000. ■

Tosto pro la sukceso de la kongreso



Ĉinaj kaj alilandaj s-anoj en la Esperanto-domo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio



Ĉinaj esperantistoj kun EPC-legantoj



En la libroservo

Kroata aktorino Vida Jerman
kaj EPC-raportisto



EPC-legantoj en
Adelajdo

ABONKOTIZO DE EL POPOLA ĈINIO POR 1998

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Pagenda sumo
Argentino	USD	12	6	18
Aŭstralio	AUD	19	24	43
Aŭstrio	ATS	184	230	414
Belgio	BEF	550	660	1210
Brazilo	USD	12	6	18
Bulgraio	USD	10	6	16
Britio	GBP	10	12	22
Ĉeĥio	USD	10	6	16
Danlando	DKK	94	122	216
Estonio	USD	10	6	16
Finnlando	FIM	74	94	168
Francio	FRF	84	108	192
Germanio	DEM	24	32	56
Greklando	USD	14	18	32
Hispanio	USD	14	18	32
Hungario	USD	10	6	16
Irano	USD	10	6	16
Irlando	GBP	10	12	22
Islando	NLG	28	35	63
Israelo	USD	14	18	32
Italio	ITL	24000	30800	54800
Japanio	JPY	1700	2160	3860
Jugoslavio	USD	10	6	16
Kanado	CAD	20	26	46
Korea Resp.	USD	12	6	18
Kroatio	USD	10	6	16
Latvio	USD	10	6	16
Litovio	USD	10	6	16
Luksemburgio	BEF	550	660	1210
Nederlando	NLG	28	35	63
Norvegio	NOK	106	134	240
Nov-Zelando	NLG	28	35	63
Pollando	USD	10	6	16
Portugaliao	USD	14	18	32
Rusio	USD	10	6	16
Slovakio	USD	10	6	16
Slovenio	USD	10	6	16
Sud-Afriko	USD	14	18	32
Svedio	SEK	116	146	262
Svislando	CHF	20	27	47
Ukrainio	USD	10	6	16
Usono	USD	14	18	32
Vjetnamio	USD	10	6	16

1. Ĉiuj evoluintaj landoj ne jam menciitaj supre laŭ Usono aŭ Nederlando.
2. Hongkong, Meksikio, Singapuro kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko laŭ Brazilo.
3. Ĉiuj landoj en Azio, Afriko, Orienta Eŭropo kaj la Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj ne jam menciitaj supre laŭ Bulgario.

Por aera sendo bonvolu nepre aldoni 18 USD aŭ egalan valoron al la pagenda sumo.

MENCIANTE urbetojn riĉajn je akvo sude de Yangzi-rivero, multaj ĉinoj rememoris jenan priskribon faritan de iu verkisto komence de la 30-aj jaroj:

Ĉe kajo de la rizvendejo Wansheng senorde kuŝas multaj boatoj el vilaĝoj. La strateto laŭlonge de la rivero estas tiel mallarĝa, ke sur ĝi 2-3 homoj apenaŭ povas marŝi ŝultro ĉe ŝultro. Tuj ĉe tiu strateto sidas la rizvendejo Wansheng. Matene, la suno penetras tra la mansardo difektita kaj haltas sur la malnova felta ĉapo de klientoj ekster la vendotablo de la rizvendejo.

La urbeto priskribita de la verkisto nomiĝas

ĉiu kun siaj propraj trajtoj, ne nur servas kiel transirejo de pasantoj kaj limo de loĝkvartaloj, sed ankaŭ ĝuigas ĉarmon de la versoj:

Ponto interligas ĉe si du loĝejojn,

Akvo preterfluas tuj la kuirejojn.

La urbeto ĉiam silentis ĝis la 20-aj jaroj. En ĝi troviĝis neniu ŝoseo kaj nur zigzagis mallarĝaj vojoj. Iu historiisto tien venis por faka laboro. Li rimarkis, ke en la urbeto estas templo konstruita antaŭ 1 500 jaroj. Kvankam ĝiaj multaj haloj jam ruiniĝis, tamen postrestis statuoj de arhat-oj faritaj de eminenta artisto de Tang-dinastio (618-907). Tie li trovis ankaŭ postsignon de poeto de Tang-

En ponto-urbeto

Teksto kaj fotoj de WANG HANPING

Luzhi, situanta sudoriente de Suzhou, Jianguo (Ĝjanguo)-provinco. Ĝiaj analogoj rakontas, ke ĝi ricevis la nomon pro interkruciĝo de 6 riveroj.

Promenante en la antikva urbeto, ĉie mi renkontis tion, kion priskribis la verkisto: Ambaŭflanke de la riveroj staras multaj ŝtonaj kolonoj en diversaj formoj kaj kun delikataj gravuraĵoj, destinitaj por kunligi haŭserojn; loĝdomoj apud riveroj, kun nigraj tegoloj, blankaj muroj kaj elstaraj firstoj gustas je antikveco; ambaŭflanke de mallarĝaj stratoj pavimitaj el rulŝtonoj staras butikoj unu apud alia. La rizvendejo Wansheng jam fariĝis kafeterio kun loka gusto. Plej impresaj estas virinoj maljunaj kaj mezaĝaj, kiuj portas triangulan kaptukon, veston el tolpecoj, mallongan jupon kaj broditajn ŝuojn. Ŝajnas, ke ili estas nacimalplimultanoj de Suzhou.

La urbeto, abunda je riveroj, stratetoj kaj pontoj, estas konata kiel muzeo de pontoj. Ĝi, kun pli ol 7 000 loĝantoj kaj areo de unu kvadrata kilometro, havas 41 pontojn en diversaj formoj. Iuj el ili tre imponas, aliaj artisme delikatas kaj triaj belas kiel ĉielarko. Ili mallonge distancas inter si. Tie estas ringforma ponto kun historio de 500 jaroj kaj la plej aĝa estis konstruita en la 10-a jc. La pontoj,

kiu ermite vivis en la loko. Dank' al tiu historiisto, la urbeto ekfamis.

Najbare de la antikva templo estas elementa lernejo fondita en la komenco de la kuranta jc. Literaturisto Ye Shengtao iam instruis en ĝi 5 jarojn. Prenante la urbeton kiel fonon, li verkis novelojn kaj prozaĵojn distingiĝajn inter la ĉinaj modernaj literaturaĵoj. Nun la lernejo estas malfermita kiel memordomo de la verkisto, kiu dormas ĉiam en la urbeto, lia dua naskiĝloko.


La loĝantoj de la urbeto vivas sufiĉe bonan vivon, sin okupante pri terkulturado, fiŝado, komerco aŭ metiarto. En la fino de la 70-aj jaroj boatoj servis ankoraŭ kiel ĉefa trafikilo. Tiam oni devis veturi per boato 3-4 horojn por atingi Suzhou je 25 km fore. Poste, kun la malfermiĝo de ŝoseoj, la trafiko sur riveroj pli kaj pli malvigligiĝis. Kaj la kajoj ne plu estis tiel movoplenaj kiel antaŭe. Nun oni bezonas nur 30 minutojn por veturi per aŭto de la urbeto al Suzhou kaj unu horon al Ŝanhajo.




Dank' al la oportuna trafiko pli kaj pli multaj turistoj venis en la urbeton. Tio plilarĝigis la vidkampon de la loĝantoj. Ili starigis kelkdek entreprenojn administratajn de ili mem. Ankaŭ iuj alilandanoj investis por funkciigi fabrikojn. Dank' al

tio la industria produktovaloro de la urbeto dudekobligis kompare kun tiu antaŭ 10 jaroj. Ĉio tio multe ŝanĝis la tradicion vivon de la loĝantoj.

Luzhi-anoj rigardas la antikvan urbeton kiel valoran heredaĵon. Por pli bone protekti ĝin ili konstruis ĉirkaŭ ĝi novajn kvartalojn industriajn, vilaan kaj ferian. En la spaco de 10 kvadrataj kilometroj ekster ĝi etendiĝas larĝaj kaj ebenaj stratoj, arbare staras modernaj etaĝdomoj.

Hodiaŭ Luzhi-anoj laboras tage en la movoplena nova kvartalo kaj revenas vespere al la hejmo ĉe kvieta rivero kun multaj pontoj. Menciante la nunan vivon, ili diris: "En la ĉielo estas paradizo kaj sur la tero — Suzhou kaj Hangzhou. Tio aludis la vivon de urbanoj antaŭe. Sed nun, ankaŭ ni kamparanoj tre bone vivas. Tie estas paradizo de Ĉinio. Vivante en la paradizo, ni trovas nin ege feliĉaj." ■





1. La urbeto en mateno
2. En ponto-urbeto
3. Strateto
4. En bazaro

1	3
2	4





Mondo de ŝtonkavernoj

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de LIU SIGONG

LA montoj kaj riveroj de Guilin, poeziaj kaj pitoreskaj, ĉarmigas unu la alian. La altaj kaj apikaj montoj abundas je ŝtonkavernoj. La interkruciĝantaj ŝtonkavernoj de la Sepstela Monto havas 44 elirejojn surtere. Fakuloj taksis, ke tie troviĝas minimume 2 000-3 000 ŝtonkavernoj, laŭ kalkulo ke ĉiu kvadrata kilometro havas 0.8-1.0 kavernon. Ili, misteraj kaj miraklaj, kaŝiĝas en densaj arbaroj, altaj montoj kaj sub torentaj fluoj, kaj interesas sennombrajn ekspediciulojn.

INTERESA VOJAĜO EN ŜTONKAVERNOJ

Nia boato veturis sur kvieta

subtera rivero. En la malluma kaverno fontas akvo el ĝiaj murfendoj. Boatisto diris, ke nun estas aprila fluso, oni povas trairi malaltajn lokojn nur kun klinita kapo, sen ajna atento oni kolizias kun groteskaj stalaktitoj. Feliĉe, surboatiĝinte, ni ĉiuj ricevis poŝlampon kaj kaskon. La lerta boatisto remis babilante kun ni. Li konigis, ke la traveturata ŝtonkaverno nomiĝas Fengyu-Roko, 5.3 km longa, kiu ligas 9 montojn. Tie abundas grasaj fiŝoj, kiuj longas malpli ol la dikan fingron, timas sunlumon kaj tuj blindiĝas elirinte el la kaverno, tial fakuloj donis al tia fiŝo la nomon blinda fiŝo. La boatisto vivtenis sin ĉefe per fiŝkaptado antaŭe, tial li klare konas la

subakvajn rifojn kaj torentojn.

Tie la montaj ŝtonkavernoj plejparte havas konvenan nomon, kia Kaverno de la Krona Roko, kiu longas dekoble kiom la ŝtonkaverno de Fengyu-Roko kaj la akvo estas profunda, tial oni nepre devas surhavi savveston por ŝipe veturi tie. La ŝtonkaverno estas 3-tavola. La malsupra estas destinita por ŝipveturado, la meza por trajno, kie estas larĝa profunda valo kun apikaj klifoj ambaŭflanke, sur kiuj dense estas groteskaj rokoj kaj tra la videblaj fendoj sur la plafono de tempo al tempo ŝvebis kanto de birdoj kaj aromo de floroj. Sur la supra oni piediras kvazaŭ en glacia kaj jada mondo. Se oni deziras havi pa-

noraman vidon al la ŝtonkaverno, oni povas preni lifton kaj rigardi tra ĝiaj fenestroj.

En Lotus-ŝtonkaverno de Yangshuo estas stalaktita liuto, per kiu oni povas ludi muzikon. Kompreneble la plej mirindaj estas la 108 lotusformaj ŝtonvazoj, flosantaj sur akvo. Pli interesaj estas la burĝonantaj roklotusoj kaj la brilaj perloj kiel lotussemoj. Iu maljunulino pie kredanta je budhismo prenis la lokon kiel budhismen paradizon kaj unuspire trapreĝis rozarion tri horojn, sidante sur la "lotus-trono".

La subtera halo kun areo de 30 mil kvadrataj metroj de Blukva Roko impresas kiel jaŭ-vilaĝo. Tie, en la kaverno kuŝas lago, ĉe kies bordo jaŭ-aj knabinoj preparis oletean trinkaĵon por gastoj. Tiam subite aŭdiĝis kanto, la kantanta knabino veturigis bambuan floson, flugis hirundoj... Jen oni prezentis, uzante la monton kaj akvon kiel scenejon.

La Ŝtonkaverno Flug-muso estas neenirebla. Ĉe la vesperiĝo cent miloj da vespertoj fajfante flugas el la kaverno. Ili flugas kun tondra eĥo malsupren, supren kaj fine flugas nigracirkle kaj malaperas en nokto...

ANTI-KVULOJ KAJ KAVERNOJ

Antikve la nacimalplimultanoj en sudokcidenta Ĉinio plejparte loĝis en kavernoj de profundaj montoj, ĉe riveroj, sin vivtenante per fiŝado kaj ĉasado. Tion konstatas la elfosaĵoj el Zengpi-ŝtonkaverno en Guilin. En la ŝtonkaverno oni trovis pli ol 30 restaĵojn de antikvuloj, kiuj vivis antaŭ 7 500-9 000 jaroj kaj grandan nombron da ŝtonaĵoj, fajencaĵoj kaj multspecajn ostojn de sovaĝaj bestoj, ĉie videblis konkaj de gastropodoj, restas ankaŭ fornoj, cindro kaj manĝaĵoj. El tio ni scias, ke en pratempo tie estis lago kaj arbaro, kiuj liveris al la homoj vestaĵojn kaj manĝaĵojn, dum la ŝtonkaverno

funkciis ne nur kiel ilia loĝejo sed ankaŭ tombejo.

Antaŭ 1 000-2 000 jaroj la sudokcidenta regiono de Ĉinio estis rigardata kiel sovaĝa kaj miasma loko. En la 5-a jc malpromociita oficisto Yan Yanzhi venis de centra Ĉinio al Guilin kaj elektis du-tavolan Duxiufeng-ŝtonkavernon kiel sian loĝejon. En la malsupra tavolo fluas akvo kaj la supra estas hela ŝtondomo, kie oni povas ĝui la belajn pejzaĝojn tra natura fenestro kaj dormi sur ŝtona lito. Li tie ĝoje legis kaj verkis poemojn, plej fruajn en Ĉinio, prikantantajn la mirindajn pejzaĝojn de Guilin. Nun oni nomas la ŝtonkavernon "Legokaverno". Foje klerulo Luo Dajing kune kun mil vilaĝanoj, tenante centojn da torĉoj, flutante kaj tamburante, ekskursis tien. La mirinda karsta pejzaĝo ekzaltis lin kaj inspiris lin verki poemojn. Li priskribis torentan subteran riveron tiele: "Mi prenis floson kaj lumigis kandelon. La flosisto veturigis ĝin en la zigzaga rivero." "La akvo klara, senfunda, la rokoj ambaŭborde aspektas kvazaŭ tigroj kaj leopardoj pretaj lukti." La pejzaĝoj estis similaj al la nunaj.

Pro milita tumulto la kavernoj funkciis kiel rifuĝejo por homoj. La vilaĝanoj proksime de Ludi-ŝtonkaverno, severe observante la admonon de prapatroj, ne malkaŝis ĝin al aliaj por eventuala bezono. Oni notis sur ĝia muro diversajn suferojn: "En 1488 oni venis ĉi tien pro ŝuldo de mono kaj greno." "En la sepa supermonato de 1663 okazis trosekeco... ĉiuj, ĉu junaj ĉu maljunaj ĉaĝeniĝis."...


Nun, en la pacaj jaroj la ŝtonkaverno donis al la vilaĝanoj aliajn avantaĝojn: Printempe ili tie faras selektadon, someran nokton ripozas, hokfiŝas, sin banas en termofonto...

ENIGMO DE LA NATURO




La loko, kie ĉarmas mirindaj

montpintoj, abudas ŝtonkavernoj, subtere fluas riveroj kaj surtere belas pejzaĝoj, estas nomata karsta topografio. Ĝi formiĝis de du kondiĉoj, erodiga flua akvo, riĉa je karbona dioksido kaj kalcŝtona roko. Guilin ĝuste posedas tiujn kondiĉojn. La ŝajne mildaj kaj belaj riveroj fakte estis senbridaj, ili penetriĝis tra la rokoj kaj valoj kaj kreis la mirindajn montpintojn sur la antikva kalkoŝtona tero leviĝinta el maro antaŭ 200 milionoj da jaroj. Ili estas mirindaj, ĉar ili ĉiuj staras solaj, ne kunligante intersi, kaj ĉiuj montoj havas kavernojn, kiuj ĉiuj kunligiĝas unu kun alia. Tiuj grandaj kaj malgrandaj kavernoj kaj fendoj jaron post jaro kunligis sin en grandan vertikalan drenreton, en kiu fluas pluvakvo kaj riverakvo, kaj tiel formiĝis subtera rivero, fontfalo, gutado el fendoj... Ili de jaro al jaro malkomponas la rokon en likvaĵon, kiu gutas konstante kaj formas stalagmitojn kaj stalaktitojn, kiuj kuntuŝiĝinte fariĝis ŝtona kolono. La akvo gutas, fluas kaj precipitiĝas, kaj la ŝtona kolono kreskas kaj grandiĝas. Pro diversformaj fendoj kaj malsamaj akvokvantoj kaj malsamaj flujaj direktoj, rapidecoj kaj faldiferencoj kaŭzis kalejdoskopajn karstajn spektaklojn, kiaj ŝtonaj pagodo, akvofalo, kurteno, muro kaj teraskampo. Sur la tegmento de la kaverno kreskas "ŝtonaj haroj", t.e. tufo post tufo da krispaj lanugoj, maldikaj kiel haroj. Ili estas kristalaĵo de vaporo en la kaverno, ankaŭ la ŝtonaj dorno, floro, vinbero k.a. formiĝis tiamaniere. Akvo, kiel magiisto, korodas la montojn en kavernojn kaj redonas al ili belajn pejzaĝojn.

La belaj pejzaĝoj de Guilin altiris al si amason da alilandaj karstologoj por esplorado. Ili unuanime opinias, ke tie kuŝas la plej bona tropika karsta topografio de la mondo kaj meritas esti karsta muzeo. ■



1. Neĝmonto spegulita en akvo
 2. Skalaktitoj en buntaj lumoj
 3. En ŝtonkaverno
 4. La ĉielo kaj la tero en ŝtonkaverno
 5. Maljunulo en fiŝhokado
- Foto de LI YASHI
- Foto de LI YASHI



Moroj pri terno

TERNO estas fiziologia fenomeno de homo. Ĝi estas tre ordinara kaj bagatela afero, preskaŭ neniu diras ion pri ĝi, por ne paroli pri verkado de speciala artikolo pri tiu temo. Sed prof. Ji Xianlin, unu el la eminentaj erudiciuloj de Ĉinio, eĉ verkis du artikolojn pri terno, kvankam li tute ne estas fiziologo. Li trovis, ke estas interesaj moroj pri terno ne nur en Ĉinio, sed ankaŭ en Hindio, kaj eĉ ne nur en Azio, sed ankaŭ en Afriko kaj Eŭropo. Jen li skribis:

Inter la ĉinaj popoloj sin trovas tia moro: kiam infano ternas, oni diras: "Centjaran vivon!". Komence mi pensis, ke tio estas nur moro en iu parto de Ĉinio. Sed poste, kiam mi studis en Germanio, kie mi devigite restis pli ol dek jarojn pro la Dua Mondmilito, mi trovis, ke tie, kiam infano aŭ plenkreskulo ternas, la apudaj personoj tuj diras "Gesundheit!" (Sanon!). Tre rimarkinde estas, ke tiu germana vorto "Gesundheit" troviĝas ankaŭ en la angla lingvo, uzata de la angloj speciale por deziri sanon al tiu, kiu ternas. Kaj laŭ la Plena Angla-Ĉina Vortaro, "Gesundheit" estas uzata de la angloj ankaŭ por tosto. Certe, en la angla ne mankas la samsenca vorto, tamen la angloj preferas la germanan "Gesundheit". Tio ja estas vere interesa.

Prof. Ji Xianlin estas fakulo pri sanskrito kaj budaismo. Li multe legis budaismajn sutrojn kaj plurfoje trovis rakontojn pri terna moro el tiuj sutroj. Li citis unu el ili por sia artikolo. En la antikva Hindio estis moro, ke oni devas diri "longan vivon!", kiam iu ternas. Sed iufoje, kiam Budao predikis, li ternis, kaj la 500 ĉeestantoj tuj unuvoĉe diris "longan vivon!" Sed tion li malpermesis. Aliffoje, kiam li predikis al amaso da aŭskultantoj, ekternis iu maljuna bonzo, kiu sidis ekster la amaso. Hazarde lia eksa edzino venis kaj aŭdis lian ternon, sed neniu el la ĉeestantoj diris al li "longan vivon!" Tion ŝi ne povis toleri. Ŝi tuj prenis teron per sia maldekstra mano, rondirigis la manon super lia kapo kaj ĵetis la teron eksteren, dirante "longan vivon!" Ŝi kaptis lin je brako kaj per kolera voĉo blasfemis. Ŝi diris al li: Kial vi volas bonziĝi kaj vivas ĉi tie? Ĉi tie troviĝas 500 jaksaĵoj (sanskrita vorto, kiu signifas kanibalsman diablon en budaisma legendo), kiuj forprenus vian spiriton, se mi ne bondezirus al vi. Vi ne devas esti ĉi tie kaj prefere iru hejmen. Ŝi tiris la bonzon kaj kune foriris.

En la libro "Historio kaj Geografio de Trans-



La aŭtoro

maraj Landoj" kompilita speciale por konigi ĉinojn pri fremdlandaj aferoj en la fino de la pasinta jarcento, la profesoro trovis interesan informon pri Abisenio (Etiopio). Oni raportis, ke en tiu lando la reĝo estis alte respektata kiel ĉiopova dio. Se la reĝo ekternas, ĉiuj en la kortego laŭvoĉe diris jes kaj eĉ tra la tuta lando la popoloj senescepte diris jes laŭte. Oni ne raportis, kion la korteganoj kaj popoloj respondis. La profesoro konjektis, ke probable ili diris "longan vivon!" aŭ similajn bondezirajn vortojn. Kaj la profesoro dubis, ĉu la korteganoj kaj tutlandaj popoloj ĉesus labori kaj longdaŭre respondus, se la reĝo senĉese ternus pro malvarmumo. Tamen, malgraŭ la dubo, la informo konstatis, ke en Etiopio ja estis moro pri terno. Tio jam sufiĉas por la profesoro, kiu interesiĝas pri tiu temo.

Pli poste, por sia faka studo, la profesoro plurfoje konsultis antikvajn ĉinajn eldonaĵojn, inkluzive notojn de diversaj aŭtoroj. En tiuj notoj li rimarkis multon pri tiu temo. Laŭ tiuj materialoj, en la antikva Ĉinio, kiam oni ternis, oni ofte diris: "Certe iu parolas pri mi." Tiu kutimo verŝajne ekzistas nur en Ĉinio, ĉar la esploro ĝis nun ne trovis la samon en aliaj landoj.


Je la fino de sia dua artikolo la profesoro konkludis:

1. Tiu moro pri terno havas historion eĉ de 2-3 mil jaroj, kaj ĝi troviĝis en multaj regionoj de la mondo.

2. Verŝajne oni kredis, ke terno aŭguras malfeliĉon, do estis necese diri ion bondeziran por forpeli la eventualan malfeliĉon.

3. Estas vere tre bagatela temo, tamen ĝi eble estas interesa kaj utila por la fakuloj pri populaj moroj.

La profesoro ne demandis en siaj artikoloj, ĉu en aliaj partoj de la terglobo estas tiaj moroj. Tamen, prezentinte la ĉefan enhavon de liaj artikoloj, mi fariĝis scivolema pri tiu demando. Eble iuj el EPĈ-legantoj, kiuj loĝas en diversaj mondpartoj, donos informojn pri tio. Mi kredas, ke tiaj informoj sendube interesos nian grandan erudiciulon. ■



Ĉe Sayram-lago

Teksto de **SUN AIJUN**

Fotoj de **LIU SIGONG**



LAŬ la norda branĉo de la Silka Vojo norde de Tian-shan-montaro ŝoseo etendiĝas de Urumĉi, ĉefurbo de la Xinjiang(Ŝinĝjang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, al la doganejo Korgas najbare al Kazahstano. Ĉe la fino de la ŝoseo kuŝas Sayram-lago, kies bordoj estas de antikve paŝtejo, kaj trapasejo por surkamelaj karavanoj vojaĝontaj al la valo de Ili-rivero.

LEGENDO PRI SAYRAM-LAGO


Mi atingis Sayram-lagon en tagmezo. Tiam la suno brilis kaj la koloro de la lago senĉese ŝanĝiĝis. La ĉielo kaj la lago kunfandiĝis sur la horizonto. La zefiro de sur la vasta lago milde kare-

sis min, ke mi sentis min kvazaŭ sur maro.


Sayram-lago, kun alto de 2 073 m super la marnivelo, lon-

go de 30 km, larĝo de 20 km kaj profundo de 90 m, estas altmonta lago plej granda kaj alta en Xinjiang. Ĝi naskiĝis pro sinkado de


SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO







1. Sur la stepo ĉe la lago
2. Melkado
3. Hejmlaboro en mateno
4. Gaja renkontiĝo



terkrusto dum formiĝo de Himalajo antaŭ 70 milionoj da jaroj. Pri ĝia naskiĝo cirkulas bela legendo inter la lokanoj.

Antaŭ tre tre longe tie sterniĝis fekunda stepo. Sur ĝi paŝtis bonkora kaj laborema knabino Qietan kun honesta kaj forta junulo Sidek. Ili enamiĝis unu al la alia. Sed la tirano sur la stepo intencis fari Qietan sia kromedzino. Rifuzinte tion, ŝi forkuris, persekutate de gardistoj de la tirano. Ŝi trovis profundan lagon kaj ensaltis en ĝin. Informiĝinte pri tio, Sidek hastis al la lago, mortigis la gardistojn kaj sin ĵetis en la lagon, vokante la nomon de sia amat-

nuboj elpuŝiĝis el la montpasejo okcidenta kaj rapide kovris la ĉielon. Tra inter nuboj sunradioj tralikiĝis kiel lumaj kolonoj. Ekpluvetis kaj en palpebruma daŭro aperis ĉielarko kun unu ekstremo en montvalo kaj la alia — sur la lago. Min kortuŝis tio, ke mi ĝuis la ĉarmon de la naturo.

KAZAĤA FAMILIO ĈE SAYRAM-LAGO

La stepo belis en matena suno. Ĉe Sayram-lago staris blanka tendo el felto. Apud ĝi knabo ludis kun hundo. La mastrino preparis manĝaĵojn ĉe la kuirforno. Mi ekbabilis kun ŝi, sed pro lingvo-

tiu tendo apartenas al lia patro, kaj la virino, kiu preparas manĝaĵojn, estas lia edzino. Tiun tagon, ili devis transloki la tendon, kaj ili buĉis ŝafon por festi tion.

Liaj pli-ol-60-jaraj gepatroj paŝtadas dum la tuta vivo. Ĉiun junion ili venas en tiun paŝtejon por grasigi siajn brutojn kaj translokiĝas en alian paŝtejon antaŭ la fino de septembro. En la pasinta jaro la maljunaj geedzoj bredis 500 ŝafojn, 70 ĉevalojn, 10 bovojn kaj 3 kamelojn. Ilia neta enspezo en la jaro superis 20 000 juanojn (ĉ. 2 500 usonaj dolaroj).

De 1991 la tieaj paŝtistoj



Larĝigo de la ŝoseo en Guozi-valo

ino. Tuj la lago ekondegis kaj dro-nigis la tiranon kaj lian palacon, kaj la vasta stepo fariĝis akrovastaĵo. La legendo montras prikantadon kaj benon de la popolo sur la stepo al la amo.

Mi staris antaŭ la lago kaj ege sentis la brulon de la suno. Sed momenton poste, grandegaj nigraj

baro ŝi ne komprenis min.

Puriginte ŝafaĵon en granda kuvo, ŝi metis ĝin en feran kaldronon. Post tio ŝi, gestante, invitis min trinki teon kun lakto en la tendo. Kiam mi sidiĝis, eniris pli-ol-40-jara viro. Li salutis min han-lingve. Li nomiĝis Tursbek Habayi. Mi informiĝis de li, ke

laŭkontrakte paŝtas brutojn. Dank' al ilia zorgema bredado, multe reduktiĝis la mortokvanto de brutoj. Nun, la loka registaro konstruigis por paŝtistoj domojn inter montoj sude de Sayram-lago. Vintre oni bredas brutojn en stalo kaj somere ankaŭ sin okupas pri terkulturado. La paŝtistoj vi-



Antaŭ pluvo



Rojo



Kvieto

Al alia herbejo



vas pli bone jaron post jaro. “Ke ni havas tiom da mono, ni eĉ ne kuraĝis imagi tion antaŭ 5 jaroj,” diris Habayi kun rideto.

La maljuna Habayi revenis rajdante sur ĉevalo. Li ekzamene rigardis siajn ĉevalojn unu post alia kaj lia edzino melkis ĉevalinojn. Ili havas 5 filojn, el kiuj 4 jam edziĝis kaj paŝtas borde de la lago. Tiun tagon, ĉiuj filoj kaj bofilinoj de Habayi helpis lin en mal-konstruado de la tendo, ŝarĝado de ĉaro kaj kondukado de brutoj. Antaŭ la translokiĝo la tuta familio el dekelkaj anoj kune manĝis kuiritan ŝafaĵon kaj trinkis kumison. La maljuna Habayi gaje ludis muzikilon kaj liaj 4 filoj kantis kazaĥan popol-kanton.

Ĉe Sayram-lago vivas pli ol 300 paŝtistaj familioj, kia tiu de la maljuna Habayi. Ĉiusomere ili stariĝas tendojn sur la stepo, paŝtas kaj ĝuas ĝojplenan vivon.

EN GUOZI-VALO

“Oni ne povas apreci la ĉarmon de Tianshan-montaro, se ne en Guozi-valo,” ofte diras Xinjiang-anoj.

Guozi-valo sin kaŝas en Taleĝi-monto sude de Sayram-lago. Ĝi, kun longo de pli ol 70 km, direktas sin de norde suden. Antaŭe troviĝis neniu vojo en ĝi. Ĉie en la loko prosperis piceoj, betuloj, sovaĝaj fruktarboj, kaj tie vivis aproj, ursoj kaj leopardoj. Laŭdire, en la 12-a jc. oni konstruis tie sufiĉe larĝan vojton por transporti armean provianton. Kaj poste ĝi fariĝis la plej mallonga vojo de Tianshan-montaro okcidenten.

Kiam ni venis al Guozi-valo, la vojo estis en riparado kaj oni faris eksplodon en ĝi. Por sekureco la veturiloj estis permesataj tra-



Guozi-valo

pasi ĝin nur nokte. Sub la preteksto, ke mi intervjuos pri la konstruado, ni eniris en la valon en kamiono.

La kamiono iris tre malrapide sur la vojo tre malglata. De la ŝoforo mi informiĝis, ke la vojo estas pli malfacile irebla en somero pro inundo, kaj oftas trafika akcidento. Aprile de 1996, la regiona registaro decidis konstrui tiun vojton en la unuaklasan en 2 jaroj.

Ĉie en Guozi-valo prosperas piceoj, unu el la plej valoraj arbospecioj en Tianshan-montaro. Laŭdire, la plej aĝa el la piceoj estas 300-400-jara, kun diametro de pli ol unu m kaj alto de pli ol

40 m. En la arbaroj kaj ĉe la riveretoj sporade kuŝas paŝtistaj tendoj.

Bedaŭrinde ni ne havis la panoraman vidon de Guozi-valo, ĉar la kamiono ne povis plu veturi antaŭen en la meza parto de la valo. Antaŭe mi informiĝis el legado, ke en la antaŭa parto la monto prezentas pejzaĝojn de 4 sezonoj. Sur la montpinto kovrita de neĝo regas frosta vintro; sur la talio de la monto pompas arbaroj; sur la malsupra montodeklivo disvolviĝas floroj kiel en somero; kaj sur la fundo de la valo pulsas printempo. ■

PRI ĈINA KALIGRAFIO

de LI QIANG

Mi ne kapablas apreci la ĉinan arton de kaligrafado. Mi volas lerni ĝin. Ĉu oni uzas antikvan stilon en kaligrafio, aŭ la artistoj mem formas la ideogramojn? Ĉu ekzistas diversaj skoloj en tiu arto? Ĉu ekzistas reguloj, kiujn la artistoj sekvas?

HERMAN THEOBALD (Svedio)


LA ĉina skriblingvo estas unu el la plej antikvaj skriblingvoj en la mondo. Ĝi estas hieroglifo. Antaŭ 3 000 jaroj oni gravuris ideogramojn sur testuda ŝelo kaj besta ostoj, kiuj estas fonto de la nuna ĉina skriblingvo. Dum la evoluado, la ĉinaj ideogramoj ŝanĝiĝis de hieroglifaj al simbolaj kaj iliaj strekoj pli kaj pli simpliĝis. La ideogramon konsistigas ĉefe punkto, angulo kaj strekoj horizontala, vertikala, oblikva kaj kurba. Kiom ajn da strekoj la ideogramo havas, ĝi ĉiam estas kvadrata, do oni nomas ĝin ankaŭ “kvadrata ideogramo”.

Kvankam ĝi estas kvadrata, ĉinoj tamen kreis multajn manierojn de skribado, tiel ke ĉiu ideo-

gramo havas diversajn skribostilojn, kiel *Zhuan*, *Li*, *Kai*, *Xing* kaj *Cao*. Ĉiu stilo havas dividaĵojn, ekz. estas granda kaj eta *Zhuan*-stiloj, *Li*-stiloj de Qin- kaj Han-dinastioj, kiuj spegulas la epokajn, regionajn kaj personajn trajtojn. Jen la ĉina kaligrafio.

Zhuan-stilo estas tre antikva. La skribo sur testuda ŝelo kaj besta ostoj estas ĝuste *Zhuan*-stila kaj havas tre komplikan strukturon kaj diversajn formojn. Ĝi aspektas ekvilibra kaj stabila. En Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) aperis *Li*-stilo, kies strekoj estas rektaj, sed ne arkaj kiel tiuj de *Zhuan*-stilo. En la lasta periodo de Han-dinastio aperis kaj evoluis *Kai*-stilo. En Tang-dinastio (618-907),

Kaligrafajoj en *Kai*-stilo



Kai-stilo atingis la kulminon de sia disvolviĝo, tiam estis multaj tre famaj kaligrafoj, Ouyang Xun, Yan Zhenqing, Liu Gongquan... kiuj ĉiuj bele skribis *Kai*-stile, sed ĉiu havis sian karakterizaĵon. Ouyang-skolo montras solidecon kaj fortecon, Yan-skolo dikecon kaj fluecon, dum Liu-skolo kun trajtoj de ambaŭ skoloj vidigas graciecon kaj firmecon. Iom post iom *Kai*-stilo iĝis norma stilo de la ĉina kaligrafio kaj oni nun ankoraŭ sekvas ĝin.

En la tradicia ĉina kaligrafio, gravas ne nur

pioj de kaligrafaĵoj. Oni proponas, ke la komentoj unue lernu *Kai*-stilon, ĉar ĝi estas regula kaj orda. En skribado *Kai*-stila, ili bone konas la strekojn kaj strukturon de ĉina ideogramo. Tio metas firman bazon por progreso en kaligrafio. Poste ili povas laŭ sia plaĉo elekti stilon por lerni. Necesas ekzercado, tiel ke ili posedos la skribostilon kaj ilia skribo eĉ havos propran trajton. En tiu senco, s-ano Theobald pravus, ke ĉinoj sekvas antikvan stilon en kaligrafio. Tamen nuntempaj ĉinoj pli

multe uzas plumon, krajonon kaj globkrajonon, do ili pli atentis la kaligrafion per tiuj "malmolaj skribiloj", sed ne tiun per peniko.

Estas multaj kaligrafoj en Ĉinio, ekz. s-ro Zhang Shufan, kiu sekvas la stilon de Zhang Yuzhao, kaligrafo de Qing-dinastio (1644-1911). Liaj kaligrafaĵoj legiĝas kiel sur steleoj, kaj estas antikvecaj, graciaj kaj majestaj. En 1995 la Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis "Imitaĵoj de kaligrafaĵoj de Zhang Yuzhao de Qing-dinastio", kiun verkis

s-ro Zhang Shufan. Li skribis ankaŭ "Verda stelo prilumas la teron" por celebri la 45-jariĝon de "El Popola Ĉinio" (la 5-a numero de 1995). Mia filo Li Yang lernis de s-ro Zhang kaligrafadon multajn jarojn kaj rapide progresis. Mi donacos al s-ro Theobald kaligrafaĵon de mia filo kiel memoraĵon.


Mi volas informi al s-ro Theobald ankaŭ tion, ke se li deziras lerni la ĉinan kaligrafion, li preparu penikon (la penika bastoneto estas farita el bambuo kaj tufo ĉefe el haroj de kapro aŭ putoro), *Xuan*-paperon (papero farita en Xuancheng, Anhui-provinco, Ĉinio), tuĉon (solida inko) kaj tuĉfrotan ŝtonplaton (sur ĝi oni likvigas la tuĉon), kiuj estas necesaj por la ĉina kaligrafio. ■



Pekina samideano Yuan Ming en kaligrafado

bele skribi ĉiun ideogramon, sed ankaŭ bone aranĝi la tutan strukturon. Inter la ideogramoj kaj linioj devas esti harmonio. Oni skribas de supre suben (ideogramon post ideogramo) kaj de dekstre maldakstren (linion post linio), tio malsamas ol la nuna kutimo. Fininte la verkon, kaligrafo ŝatas sigeli ĝin per sigeliloj, inter kiuj la kvadrataj ĝenerale montras la nomon de la kaligrafo, kaj la aliformaj donas iom da gusto al la verko. Ruĝaj stampoj ornamas la blankan paperon kaj nigrajn ideogramojn kaj donas pli da ĉarmo kaj spirito al la verko.

Ĉinaj infanoj lernas kaligrafion en elementa lernejo. Unue ili paŭsas kaj poste skribas laŭ ko-



Ŝipo en formo de etaĝdomo

Skulptaĵo el taksusa ligno

Teksto de ZHOU SHUZHEN

Fotoj de HAN HONG

La ligno de taksuso taŭgas por konstruo de ŝipoj pro siaj malmoleco kaj akvo-imuneco. Juna kamparano Chen Huasheng el Fujian(Fuĝjan)-provinco, suda Ĉinio, faris metiartajn ŝipojn el la menciita ligno.

Dum turismado Chen rimarkis, ke lignaj skulptaĵoj kun antikva stilo estas tre ŝatataj de turistoj. En lia hejmloko abundas arbaroj. Li decidis entrepreni metiartaĵan fabrikon, profitante de la naturaj riĉfontoj. Do, li petis metiistojn doni instruadon kaj ellernis lignoskulpturon.

En Ĉinio velŝipo simbolas, ke ĉio bone iras sub konstanta favora vento. Inspirite de tio, Chen ja


decidis en la komenco skulpti velŝipojn. Profitante de la malmoleco, delikataj vejnoj, brila kaj ruĝa koloro de taksusa ligno, Chen faris, per skulptado, reliefa kaj aĵura, velŝipojn antikvecajn en diversaj formoj kaj kun kompakta strukturo. Liaj velŝipoj estas tre bone konstruitaj, facile mal- kaj remunteblaj.

En iu ekspozicio liaj velŝipoj allogis multajn alilandanojn kaj tuj elvendiĝis. Samtempe li akceptis multajn mendantojn.

Nuntempe lia metiartaĵa kompanio skulptas ne nur lignajn ŝipojn, sed ankaŭ budhostatuojn kaj teservicojn, kiuj vendiĝas en sudorienta Azio kaj aliaj regionoj.



Chen Huasheng en skulptado de ŝipo



Velŝipo



Majtrejo



Naŭdraka ekrano

MA GUIHUA kaj XIONG LEI:

Kiam ili plenkres- kas...



Studentino instruas vilaĝajn knabojn en someraj ferioj.

EN 1978 la ĉina registaro ekpraktikis la politikon de naskolimigo (escepte en nacimultiplimultaj regionoj), ke unu paro da geedzoj nasku unu infanon. Preskaŭ 20 jaroj pasis kaj el la politiko rezultis: Unuflanke, malstreĉiĝis la premio kaŭzita de loĝantara dilatiĝo; aliflanke, 20 procentoj da familioj fariĝis solinfanaj.

“MALGRANDAJ REĜOJ” KRESKIS

Ĝenerale ĉinaj solinfanoj denaske okupas plej altan pozicion en la familio kaj estas tro dorlotataj de la gepatroj kaj geavoj, kaj pro tio ili ricevis la nomon “malgranda reĝo”.

Enketo montras, ke 60% da novaj ĉinaj studentoj estas “malgrandaj reĝoj”. Nemalmultaj el ili unuatage veturis al universitato per taksio en akompano de siaj gepatroj, eĉ geavoj, kiuj helpis ilin porti pakaĵojn kaj plenumi enirajn formalizaĵojn. Tiu fenomeno estas tre pensiga. Al ĉi-generaciaj

solinfanoj la gepatroj ŝajne faris nur du aferojn: devigi ilin eniri universitaton, samtempe doni al ili dorloton kiel kompenson.

Nun, kiam la kreskintaj solinfanoj eniris universitaton, oni nature demandas: Ĉu tiuj dorlotitaj infanoj povas vivi sendepende? Ĉu ili povas firme stari en tiu ĉi socio kun ĉiam pli intensiĝanta konkurenco? Aŭ plie, ĉu ili povas preni sur sin la respondecon por la socio?

KIU KULPAS?

La 19-jara Shen Yang, duaklasa studentino de la Pekina Dancarta Instituto, diris: “Estas ne juste altrudi al ni la etiketon de malgranda reĝo. Ni estas dorlotitaj de la gepatroj. En tio ili multe kulpas.” En sia 7-jara aĝo, Shen Yang devigite eklernis pianludon. “Iusomere, por ke mi lernu pianludon, la patrino portante min en brakoj piediris longan distancon,” ŝi diris. Tiam ŝi loĝis en Nankino, kiu

ofte havas temperaturon de 40 °C en somero. Ŝi opinias, ke ŝiaj gepatroj metis tro multe da espero sur ŝin, ilian solfilinon.

Lastjare, por helpi la solfilinon sin prepari por la studentiga ekzameno, Lu Xiaofei, sperta raportistino de Pekino, rezignis la ŝancon unuafoje viziti eksterlandon. Sed tiam, kiam Lu Xiaofei siatempe forlasis Pekinon kaj siajn gepatrojn por labori en fora kamparo, ŝi estis nur 16-jara. Komparante sian sendependecon en junaĝo kun la dependeco de la filino, Lu Xiaofei konfesis: “Kiel gepatroj ni eble faris ne ĝustan. Ŝajne ni kreskigis niajn gefilojn en niaj brakoj.”

Sun Yunxiao, specialisto pri infanaj problemoj, opinias, ke simila fenomeno estas ofte vidata. Li diris: “Multaj gepatroj travivis la socian ĥaoson okazintan en Ĉinio en la 60-70-aj jaroj — la kulturen revolucion kaj la movadon ke junaj intelektuloj laboru en kamparo. La nunaj solinfanoj vivas en situacio de stabila politiko kaj kompare evoluinta ekonomio. La malsamaj travivaĵoj de la du generacioj kaŭzis malsamajn komprenojn kaj sintenojn al la vivo.” Plie, en tiu periodo la gepatroj ricevis edukon pri modesta vivado kaj penema luktado, pri heroeco kaj kolektivismo; sed iliaj solinfanoj en la kadro de reformado kaj pordomalfermo estas influataj de ĉiuflankaj pensfluo de la mondo. “Tial inter la du generacioj ekzistas granda diferenco en takso de valoro de homa vivo.”

Alia kialo kuŝas en tio, ke la gepatroj ĝenerale metas sur la infanon sian idealon, kiun ili ne realigis en la junaĝo. Ekz., ne havinte la ŝancon lerni pianludon, ili devigis la infanon lerni ĝin; ne havinte la ŝancon ricevi altlernejan edukon, ili devigis la infanon fariĝi studento; multe suferinte, ili laŭeble havigis al la infano komfortan vivon, kaj plenumis preskaŭ ĉiujn liajn petojn.

ĈU MALAPEROS LA MALTRANKVILOJ?

Malgraŭ tiuj problemoj pri edukado de solinfanoj, prof. Sun Yunxiao opinias, ke la apero de solinfanoj markis evoluon de la socio. Ankaŭ universitata prof. Cao Jinqing de Ŝanhajo opinias, ke

solinfana fenomeno fakte estas forta atako al la ĉina tradicia patriarkeco. Ĉar tradicie en ĉinaj familioj, neŝancelebla estis la patriarka majesteco. La rilato inter gefiloj kaj gepatroj neniam estis tiel egala kiel nun, kaj la familia demokratio certe bone influos la tutan socion.

Ŝanhajo estas unu el la ĉinaj urboj, kiuj la unuaj ekpraktikis la politikon de solinfano. En 1996 oni tie faris enketon kun 272 detaloj, por kompari 434 solinfanojn kun 482 nesolinfanoj. Rezulte, 76% da detaloj montras, ke inter ili ne ekzistas esencaj diferencoj, kaj solinfanoj havas pli altan klarecon kaj pli fortan deziron altigi la klarecon kaj pli multe zorgas pri la realiĝo de persona valoro kaj kreivo.

En la sama jaro, oni faris alian enketon en 60 lernejoj de 12 urboj. 3 349 solinfanoj estis demanditaj. Rezulto montras la bonan evoluon de iliaj karakteroj. 30% da solinfanoj klare esprimas ke ili volantas amikiĝi kun aliaj; 84% estas simpatiemaj kaj volas helpi vunditojn aŭ malsanulojn; 60% ŝatas fari ion persiste; 71% konsideras sin kapablaj kaj allogaj.

Antaŭe multaj homoj opiniis, ke la solinfanoj de tiu ĉi generacio zorgas nur pri si mem, sed ne rekompencas aliajn. Post la enketo oni devas diri, ke tia opinio estas malĝusta. Esence la ĉinaj solinfanoj estas progresema, kvankam ili havas mankojn en karaktero, kiaj enfermiĝemo, dependeco kaj trosinamo. Ekz., la enketo montras, ke la infanoj ĉiutage faras hejmlaboron meznombre malpli ol 12 minutojn, 12% da ili eĉ neniam faris tian laboron.

Kompreneble, kiel ajn maltrankvila oni estas, la solinfanoj de tiu ĉi generacio fariĝos ĉefforto de la ĉina socio en la 21-a jarcento. Pri tio la solinfanoj estas memfidaj. En la lastaj tagoj en Ĉinio estis vaste disvendata la libro «Manifesto de Solinfanoj», en kiu iu triaklasa lernanto de supera mezlernejo diris: “Mi scias, ke multaj homoj estas maltrankvilaj pro ni. Tio estas kompreneble ŝanĝebla.” Pli memfida estas iu knabino: “Neniu scias, kiel bonaj ni fariĝos.” ■

Estas bonvenaj represoj kaj tradukoj el “El Popola Ĉinio” kun indiko de la fonto, kaj la redakcio kore petas ties specimenojn.

KOREKTO

Legu *Nakagaki Kojiro* anstataŭ *Nakagaki Torajiro*, p. 8, dekstra kolumno, 5-a linio, n-ro 8, 1997. Ni dankas s-ron Mine Yositaka pro lia rimarkigo.

La Red.



Al laboro

ORDINARAJ ĈINOJ

Karboministoj

Teksto de ZHANG MEIZHI

Fotoj de ZHAO XI

Forlasinte sian hejmlokon, Yang Jinjing (Jang Ĝinĝing) kaj aliaj laboristoj venis en la Aŭtonoman Regionon de Interna Mongolio por konstrui la karbominejon Jungar. Sed li maltrankviliĝis, ĉar lia novedzino ankoraŭ ne havis laboron. Baldaŭ lia problemo estis solvita. Kaj naskiĝis al ili filino tre aminda. De tiam li sin dediĉis al la laboro kaj diligente studis la teknikon de elektronika regado. Foje pertubiĝis la elektra ŝovelilo importita el alia lando. Li malmuntis ĝin kaj kontrolis ĝiajn pli ol 30 pecojn unu post alia. Finfine li riparigis ĝin. Tio plie diligentigis lin en studado de la tekniko. Nun kiam iu instalaĵo ne plu funkciis, oni kutime diris: "Venigu


Yañg!"

Oficistoj kaj laboristoj de la minejo plejparte venis el aliaj lokoj de Ĉinio. Luj eklaboris tie post diplomiĝo el universitato. Se oni demandis, kial ili volas labori tie, ili respondis kun fiero: "Tio estas grava konstruo investita de la ŝtato. Ĉiu volas fari grandan aferon!" Certe, ili havas multon por fieri: tie kuŝas vasta karbobaseno kun jara produktokvanto de 12 milionoj da tunoj kaj modernaj instalaĵoj. Sole rado de la kamiono altas je 3 m...

Ĉiutage la karboministoj ripetas la samon: Matene, ili veturas de la loĝkvartalo al la minejo per trajno. Ili estas pure vestitaj. Luj el ili portas



En la infanĝardeno de la karbominejo



En la karbominejo



Yang Jinjing kaj liaj familianoj

Karboministoj en profesia trejnado



Riparo de karbokolekta maŝino
Foto de SHI CHANGJIANG



kun si gamelon. Kvankam estas manĝejo en la minejo, tamen ili preferas manĝaĵon preparitan de ili mem. Dum la 20-minuta trajno-veturado iuj babilas, aliaj dormetas kaj triaj ludas kartojn. Menciante laboron, iu laboristo diris serioze: "En la minejo ni devas labori tutanime, neniu ludas."

150 000 BAMBUAJ SLIPOJ ELTERIGITAJ

Antaŭ unu jaro ĉinaj arkeologoj elfosis 150 000 bambuajn slipojn faritajn antaŭ pli ol 1 700 jaroj, kio faris sensacion en la ĉina arkeologia rondo.

En la ĉina historio de 220 ĝis 280 p.K. la tri regnoj Wei, Shu kaj Wu rivalis inter si. Tiuj elterigitaj bambuaj slipoj estas historia materialo de Wu-regno. Ili estis konservitaj en seka puto, kovrita per bruna tero dika je dekoj da cm kaj malmulte da blanka argilo ĉirkaŭe. Arkeologoj supozis, ke siatempe oni intence kaŝis tie la bambuajn slipojn, kaj la blanka argilo estis uzata por eviti putriĝon.

Laŭ la takso de arkeologoj la ĉi-foje elfositaj bambuaj slipoj kun ĉ. miliono da ideogramoj estas malsamlongaj kaj malsamlarĝaj. La supra kaj malsupra finoj de la slipoj surhavas postsignon de silkaj rubandoj, kiuj jam putriĝis. Oni bonordigis malgrandan parton de la slipoj kaj trovis, ke ili plejparte montras la tempon kun la enhavo pri politiko, ekonomio, militaj aferoj, kulturo, lupago kaj imposto, familia registro, justico, registara ofico ktp de Wu-regno.

Nun arkeologoj provas konservi ilin per pli avangarda tekniko. Krome, oni konstruos en Changsha muzeon de bambuaj slipoj de Wu-regno. Ĝi malfermiĝos en la venonta jaro.

ŜJŬAN-PAPERERO

Oni atribuas la sukceson de la ĉina kaligrafio kaj pentrarto al ŝjŭan-papero. Jingxian-gubernio de Anhui-provinco, kiu produktas ŝjŭan-paperon, apartenis al Xuan(Ŝjŭan)-prefektujo antikve, kaj pro tio oni nomas la de ĝi produktitan paperon ŝjŭan-papero. Ĝi kreiĝis en la 3-6-a jc. Ĉar en prilaborado oni plejeble forigis el ĝi facile oksideblajn sub-

stancojn, por ke ĝi estu kontraŭkoro, kontraŭmorda kaj nedeformebla, tial oni donis al ĝi alian nomon "miljara papero".

Ŝelo de pteroceltoj (*Pteroceltis tartarinowii*) kaj pajlo estas ĉefaj materialoj por ŝjŭan-papero. Oni prenas la ŝelon de dujaraj pteroceltaj branĉoj, plurfoje vaporumas kaj kuiras ĝin, maceras ĝin en mortero kaj sternas ĝin sur montdeklivo. Post 1-2-jara sunumado kaj pluvado oni ĝin selektas, muelas kaj prilaboras en paston, i.a. multaj procedoj estas mane faritaj. La fabrikoj de ŝjŭan-papero senescepte estas en profundaj montoj aŭ valoj, kie dense kreskas arboj, bambuoj kaj fluas klara rivero. Ĉar de antikve oni opinias, ke la kvalito de akvo decidas tiun de la papero, kaj la ŝelo de pteroceltoj sunumita sur roko en profunda monto distingiĝas per sia koloro kaj pureco.

MIGRADO KAJ ADMINISTRADO DE LA LOĜANTOJ

Nun en Ĉinio ĉ. 80 milionoj da superflua kamparaj laborfortoj migris en urbojn grandajn kaj mezgrandajn, kaj ĉemarajn regionojn ekonomie disvolviĝintajn. Ili okupiĝas pri diversaj laboroj, kiaj domkonstruado, preparado de manĝaĵoj kaj servado.

En Pekino la ĉestrataj ŝuflikistoj kaj vendistoj de matenmanĝo plejparte venis el la kamparo de Jiangsu- kaj Zhejiang-provincoj, dum la vartistoj plej frue venintaj al Pekino ĉefe estis kamparaninoj de la provincoj Anhui kaj Sichuan. Ilia enmigrado unuflanke akcelis la urban ekonomian disvolviĝon, prosperon de la merkato kaj faciligon de la vivo de la urbanoj, aliflanke la drasta kreskado de la enmigrintoj kaŭzis plimultiĝon de krimoj kaj pezan ŝarĝon al la urba administrado.

Por ke la superflua kamparaj laborfortoj migru en ordo, la urbaj kaj regionaj administracioj pri laborfortoj ellaboris rimedojn, cele fortiĝi sian kontroladon al la enmigrintoj, kaj atingis iom post iom sukcesojn. Nun en Ĉinio 21 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj ellaboris regularon pri kontrolado al la nekonstantaj loĝantoj. Iuj urboj eĉ ekfunkciigis specialajn lernejojn por ili, cele levi ilian klarecon kaj laboran nivelon. Kun la disvolviĝo de la ĉina kampara ekonomio iuj kamparanoj, enmigrintoj en urbojn por "lavi oron", jam revenis por partopreni en la hejmloka konstruado. Tio povas mildigi la ŝarĝon de la urboj far la ĉinaj migrantoj, kaj la kontrolado al la migrantoj povas esti iom post iom reguligata.



La Jinan-a Pontego super la seka Flava Rivero

LA FLAVA RIVERO HALTIS EN SIA MALSUPRA PARTO

La Flava Rivero, 5 464 km longa, estas la dua granda rivero en Ĉinio.

Tamen, de 1972 ĝis 1996 ĝi haltis 19-foje en sia malsupra parto. En 1996 la flualto daŭris 136 tagojn. La fluo refoje haltis en 1997 en la malsupra parto kaj la rivero denove ekfluis nur post kiam pluvegis en julio kaj aŭgusto.

Flualto de la Flava Rivero ĉesigis kaj duonĉesigis la laboron de multaj entreprenoj ĉe la rivero, kio multe ĝenis la vivon de la loĝantoj. Ĉe la enfluejo de la rivero pereos koilioj (*Coilia ectenes*) kaj kraboj. Pli ol 800 specioj da akvaj estaĵoj, cent specioj da sovaĝaj plantoj kaj birdoj en la naturparko de la delto de la rivero estas minacataj.

Koncernaj fakuloj analizis, ke flualto de la Flava Rivero aperis ĉefe pro malmulta pluvkvanto en la lastaj jaroj en la basenoj de la rivero kaj granda kresko de akvokonsumado; manko de unueca administrado kaj reguligo de la rivero; la intencata akvokonduka povo de diversaj akvoutiligaj konstruaĵoj en malsamaj lokoj ĉe la rivero multe superanta la provizan povon de la rivero; serioza malŝparo de akvo, ktp.

En la pasintaj cent jaroj en Ĉinio la klimato ĉiam pli varmiĝas kaj sekiĝas, kaj la akvofonto de la Flava Rivero ne sufiĉis. Por tio fakuloj proponis: la ŝtato kaj ĝiaj divers-nivelaj registaroj alprenu efikajn rimedojn por bremsi daŭran malpliigon de akvo en la meza kaj malsupra basenoj de la rivero kaj la ĉiam pli seriozan flualton en ĝia malsupra parto. Tio estas rigore regi postulon pri akvo, praktiki permesan sistemon por preni akvon kaj limigi disvolviĝon de industrio kaj agrikulturo bezonantaj grandan kvanton da akvo; disvastigi ŝprucan, gutigan, enfiltriĝan kaj aliajn ŝparemajn irigaciojn; konstrui akvoutiligan pivotan konstruaĵon ĉe la trunka parto de la rivero kaj ebenajajn akvokonservejojn en la regiono de la enfluejo por akumuli pli da akvo en inundo por sekeca sezono. La baldaŭ lanĉota akvoutiliga konstruaĵo Xiaolangdi de la Flava Rivero kredeble ludos tiun reguligan rolon.

FAME helpas ne nur famulojn

Denove FAME-fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj ebligas realigon de gravaj projektoj. En la listo de ĵus decidita subtenoprogramo elstaras **ĉin-medicina fakvortaro**, kiu prezentos la bazan sistemon de l' aparta ĉina medicino. La kompila grupo sub gvido de profesorino Gu Jianhua ellaboris tiun ĉi ampleksan terminaron kun ĉ. 1 0000 kapvortoj en la lingvoj ĉina, angla, franca kaj Esperanto; klarigojn la vortaro donas en la lingvo internacia. Ĝi servos kiel nemalhavebla konsultlibro ne nur por orientaj sed ankaŭ por okcidentaj fakuloj, kiuj interesiĝas pri la tradicia kaj mondfama ĉina medicino. Spite al sindonemo de la kompila grupo, kiu rezignis pri iuj ajn pagoj, eldono de tia giganta verko kompreneble estas kosta: temas pri 4 000 germanaj markoj. Ĉar tiu sumo kaŭzas problemon eĉ al finance bone ekipita FAME, ĝi povas subvencii la projekton nur per 3 000 markoj; pliajn mil markojn donos FAME-premiito Bruno Vogelmann, kiu jam de multaj jaroj diversmaniere subtenas ĉinajn esperantistojn.

Alia scienca projekto, kies realigon FAME ebligas per subvencio, estas studaĵo de japana lingvisto Hiroshi Nagata pri tiel nomata **generativa gramatiko**, relative nova kaj ne vaste konata kampo de lingvistiko. Krome la fondaĵo per konsiderinda sumo subtenis la unuan Esperanto-kultursemajnon en Aalen, Germanio. Eldonejo *Heroldo de Esperanto* ricevas subvencion por eldoni Esperanto-lerolibron en Bosnio-Hercegovino. Inter la projektoj, kiujn FAME-fondaĵo subvenciiis en antaŭaj monatoj, estas ekzemple eldono de originale en Esperanto verkita romano "Iŝavasjam, la hejmo de Dio" de Aŝivini Kumar (premiita en Belartaj Konkursoj de UEA), dua kompaktdisko "Vinilkosmo" kaj "Eŭropa Kalendaro". Cetere, ankaŭ por la ĵus aperinta verko "Monumente pri Esperanto" FAME donis subvencion de 5 000 germanaj markoj.

Multaj pliaj projektoj atendas helpon de la fondaĵo, kiu finance subtenas ankaŭ tre ofte malpli kostajn, tamen valorajn iniciatojn, kiuj povas realiĝi nur per mono disponigata de FAME; sed ne eblas listigi ĉi tie ĉiujn tiajn projektojn. Por subtenado la fondaĵo havas severajn kriteriojn; tial ĉiu, kiu donacas monon al FAME, povas esti certa ke la helpo utilos al tiuj, kiuj vere meritas ĝin. Do ne hezitu nutri per via mondonaco FAME-fondaĵon, tiel ke ĝi laŭeble longan tempon povos daŭrigi sian benoŝan agadon en la servo de la interkompreniĝo tutmonda. Informilon volonte sendos al vi FAME-prezidanto Stefan Maul (Pferseer Str. 15, DE-86150 Augsburg, Germanio).

FAME-fondaĵo estas agnoskita je publika utilo; celoj: internacia kompreniĝo, evoluhelpo, scienco kaj esploro, junularo kaj kulturo. Konto-numero 110000787 ĉe Kreissparkasse Ostalb, Aalen bank-kodo 61450050

Pri la tibeta medicino



Tibet-medicinaj kuracistoj en analizo de kazo

MI ne scias, ĉu niaj legantoj iom konas la tibetan medicinon. Mi opiniis, ke ĝi estas mistera same kiel mirakla neĝkovrita altebenaĵo.

Foje, min vizitis mia amikino, kiu pro grava reŭmatoidismo ne povis piediri jam tri jarojn. Ŝia resaniĝo mirigis min. Kiel ŝi resaniĝis tiel rapide? Ŝi diris al mi, ke ŝi estis kuracata per droga bano, en la Tibet-medicina Hospitalo de Pekino. Post kelkaj seancoj ŝi ja povas marŝi tute libere. Pro scivolemo mi vizitis la nomitan hospitalon.

Ĝi situas en ordinara korto. Sur muro de la kuracejo pendas portreto de antikva tibet-medicina majstro Yutuoningma Gongbu. La libro "Si Bu Yi Dian" skribita de li antaŭ 1 000 jaroj estas plej elstara kaj kompleta verko pri la tibeta medicino kun historio de 2 300 jaroj. Hodiaŭ la tibet-medicinaj kuracistoj ankoraŭ kutimas konsulti ĝin por fari diagnozon. En la hospitalo mi vidis, ke tibet-medicinaj kuracistoj demandas malsanulon pri liaj simptomoj, palpas al li la pulson kaj preskribas medikamenton, kiel ĉin-medicinaj kuracistoj. S-ro Renwang, estro de la hospitalo, diris, ke la tibeta medicino formiĝis surbaze de la batalo kontraŭ

malsanoj far antikvaj tibetanoj, asimilante esencajn partojn de la ĉina kaj hinda medicinaj. La tibet-medicinaj kuracistoj diagnozas ĉefe per pririgardo, palpo kaj demandado. La pririgardo estas, ke kuracisto pririgardas la vizaĝon, figuron, haŭtokoloron kaj precipe langon kaj urinon de paciento. La palpo signifas, ke kuracisto faras palpadojn por scii la korpotemperaturon kaj haŭtodelikatecon de paciento. Kaj la palpado de la pulso havigas al la kuracisto informojn pri la sanstato de la paciento, kio tre utilas al diagnozo. Kompreneble, la kuracisto demandas ankaŭ pri la kaŭzo kaj tempo de malsaniĝo, malsana korpoparto kaj apetito. Unuvorte, la tibeta medicino estas bazita sur solida teorio. Oni trovas ĝin tre mistera nur pro tio, ke ĝi estas malmulte konata.

La diferenco inter la tibet-medicina hospitalo kaj la aliaj konsistas nur en tio, ke sur la tablo de ĉiu kuracisto estas dika albumo pri konstruaĵoj, homfiguroj, bestoj, vegetaloj kaj aliaj objektoj, sur ĉiu folio estas portreto de koncerna farmaciisto. S-ro Renwang konigis al mi, ke la originaloj estis faritaj de tibet-medicinaj kuracistoj per naturaj farboj sur lina tolo antaŭ 300 jaroj. La albumo

entute nombras 80 bildojn. Ili vivece montras la originon, teorion kaj praktikon de la tibetaj medicino kaj farmacio. Ĝi estas utila por plene posedi "Si Bu Yi Dian" kaj la tibetan medicinon. La albumo estas rara en la medicina kaj farmacia trezorejo de la tuta mondo. Mi vidis, ke sur bildo estas prezentitaj la formo kaj lokalizo de embrio en kreskado, tre similaj al tiuj en anatomio de la moderna medicino. Estas neimageble, kiamaniere oni vidis la evoluon de la embrio kaj pentris ĝin siatempe.

Pro sia famo la hospitalo allogis multajn pacientojn. Mi vizitis kelkajn el ili, inkl. de suferantoj de dermatozo kaj malsanoj stomaka, kardiovaskula kaj cerebrovaskula. Ili diris al mi, ke post kuracado en la hospitalo, ilia sufero iagrade mildiĝis. Mi informiĝis de s-ro Renwang, ke tibet-medicinaj kuracistoj kuracas ĉefe per du metodoj, t.e. preskribi medikamenton kaj doni kuracadon ekster la korpo. La tibet-medicinaj medikamentoj estas ĉefe pilolo, pulvoro, unĝento, tizano kaj eliksiro. La tibetaj drogoj estas mineralaj, animalaj kaj vegetalaj. Kompare kun la ĉin-medicinaj drogoj, la tibetaj estas ĉefe mineralaj kaj animalaj, inkl. de tiuj el perlo, jado, koralo, oro kaj arĝento. Ĉar multaj el ili produktiĝas ekskluzive en Tibeto, la medikamentoj uzataj en la hospitalo senescepte estas transportitaj el la regiono. En la apoteko mi vidis, ke la ujoj grandaj kaj malgrandaj ĉiuj estas plenaj de medikamentoj kaj iuj pli valoraj en luk-saj pakoj. La medikamento Perla Pilolo el 25 Substancoj tre efikas por kuraci kardio- kaj cerebrovaskulajn malsanojn. Oni devas infuzi ĝin en taso por la tuta nokto kaj preni ĝin en la sekvanta mateno. Oni diris al mi, ke tio estas utila por ke la medikamento estu plene asimilata, kiam la stomako estas malplena. La tibeta medicino alte taksas la sanon de stomako. Oni tabuas ĉiajn manĝaĵojn dum prenado de pluraj medikamentoj. En la tibeta medicino estas ankaŭ masaĝo, artemizia akupunkturo, varma kompresado, traktado per fumo, ŝmirado kaj sang-ellaso. Ankaŭ la droga bano, per kiu oni resaniĝis mian amikino, estas unu el la tibetaj terapioj. Laŭ postulo de kuracisto ŝi devas sin bani per droga likvaĵo 40 minutojn ĉiufoje, post tio tuj enlitiĝi kaj firme meti sur sin vatitan litkovrilon kaj meti la varman drogan likvaĵon sub la liton por daŭre vaporumi ĝis ŝi ŝvitegas. S-ro Renwang diris al mi, ke la tibet-medicina kuracado ekster la korpo similas al la ĉin-medicina, tamen ĝi havas siajn proprajn karakterizaĵojn, ekz. la artemizia akupunkturo. Antaŭ la akupunkturado oni devas ĉirkaŭvolvi la pinglan pinton per artemizio, bruligi la lastan por ke la pingla pinto fariĝu varma, ĉar la varmeco estas ankaŭ utila al la kuracado. Kaj plie, oni akupunkturas ĉefe la korp partojn ĉe la spino, ĉar tibet-medicinaj kuracistoj opinias, ke la homaj

(Daŭrigo sur p. 49)

La 2-a Internacia Himalaja Renkontiĝo

(26-a de februaro - 7-a de marto 1998)

La Nepala Esperanto-Asocio ĝojas anonci la duan Internacian Himalajan Renkontiĝon por konigi sian landon al alilandaj esperantistoj. La sperto devigos vin kredi ke apenaŭ ekzistas alia lando en la mondo kiu estas komparinda kun Nepalo je natura, etna kaj kultura diverseco. Oni nomas 1998 "Jaro por Viziti Nepal". Do ankaŭ vi kaptu la ŝancon!

Vi pasigos unuajn kaj lastajn tagojn de la renkontiĝo en Katmanduo, ĉefurbo de Nepalo. Post promenado en Pashupati, Baudha kaj Bhaktapur en la unua tago, vi promenos al Katmanduo kaj Patan en la dua tago.

Dum la sekvanta tago vi spertos aventuron de perflosa boatado sur rapida rivero Trishuli. Poste vi veturos rekte al Chitwan. La ĉefa parto de la renkontiĝo estos vizito de Chitwan Nacia Parko. Tiu ĉi granda muzeo de diversaj animaloj, eble unu el la plej ĉarmaj naciaj parkoj en la mondo, situas nur 165 km sudokcidente de Katmanduo. Ĝi enhavas multajn sovaĝajn bestojn, pli ol 400 specojn da birdoj kaj nekalkuleble abundajn specojn da verdaĵoj.

Pokhara, situanta okcidente de Katmanduo je 200 km, estas paradizo por naturamantoj. Tie vi povos ĝui fabelan panoramon de Dhaulagiri, Annapurna, Manaslu, Machhapuchhre kaj aliaj belegaj montpintoj.

Reveninte al Katmanduo, vi partoprenos grandan kunvenon de esperantistoj, kie vi havos ŝancon aŭskulti ĉion pri enlanda E-movado, kaj viaj valoraj sugestoj estos atendataj. Kaj ne povus iu kunveno finiĝi sen manĝado, babilado, kantado kaj dancado.

Kotizo

A: 750 usonaj dolaroj por unu persono el ĉiuj landoj escepte de tiuj menciitaj ĉi-sube en grupo B

B: 700 usonaj dolaroj por unu persono el Bulgario, Ĉeĥio, Slovakio, Hungario, eks-Jugoslaviaj landoj, Rumanio, Pollando, eks-Sovetuniaj landoj, ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko kaj Latinameriko

Interesatoj kontaktiĝu kun la Komitato de la 2-a Internacia Himalaja Renkontiĝo. Adr.: Sierra Travel and Tours (P) Ltd. PO Box: 3565 Kathmandu, Nepalo



Antikva piedpilko

de PANG BIAN

ANTIKVAJ ĉinoj nomis piedpilkon ledpilko, kiu originis eble de ŝtona pilko. En multaj lokoj de Shanxi-provinco oni elterigis ŝtonajn pilkojn, el kiuj iuj pezas je du kilogramoj, aliaj je nur 90 gramoj. Ĉar ili ŝajne ne estis uzataj por ludo, arkeologoj konjektis, ke antikvuloj kunligis du aŭ tri ŝtonajn pilkojn kun leda rubando, tenis unu ŝtonan pilkon, ŝvingis la rubandon super la kapo kaj ĵetis ĝin al besto aŭ malamiko por ĉirkaŭvolvi iliajn piedojn kaj kapti ilin. En Banpo-ruino de Shaanxi (Ŝenŝji)-provinco oni elterigis en la tombo de iu 3-4-jara knabino tri malgrandajn ŝtonajn pilkojn, kiuj evidente estis ludiloj. Ankaŭ en Anhui-provinco oni elterigis centon da delikataj fajencaj pilketoj faritaj antaŭ 5 mil jaroj, ili supozeble estis ludiloj, ornamaĵoj aŭ oferaĵoj.

Pri la origino de piedpilka ludo historia libro diras: "Leda pilko, laŭdire, estis inventita de Huangdi aŭ farita en la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.)." Huangdi estis tribestro de fora antikveco, al kiu oni atribuis la meriton de invento de leda pilko, tio nur estas onidiro. Estas certe, ke en la periodo de Militantaj Regnoj tre furoris la piedpilka ludo. Tiam ofte okazis militoj, kaj la piedpilka ludo disvolviĝis kiel unu el la soldataj ekzercoj. Poste la sporto disvastiĝis en la popolo. Historia libro diras: "Qi-regno estas riĉa, ĝia popolo senescepte scipovas ludi muzikilojn kaj pied-



Kupra spegulo pri piedpilka ludo farita en Song-dinastio (960-1279)

pilkon."

Fariĝinte la unua imperiestro de la Okcidenta Han-dinastio, Liu Bang (206-194 a.K. sur trono) invitis sian patron el kamparo en la kortegon en Chang'an (nun Xi'an). Tamen la maljunulo ne kutimis al la kortega vivo. Li diris: "Mi nur ŝatas kune kun buĉistoj kaj etvendistoj trinki alkoholaĵon, vendi patkukon, bataligi kokojn kaj ludi piedpilkon." Tial Liu Bang tuj ordonis konstrui en antaŭurbo de Chang'an novan urbon similan al lia naskiĝloko kaj loĝigis en ĝi samlokanojn por ke ili akompanu lian patron.

Tiel la piedpilka ludo venis en la kortegon, kaj Liu Bang mem fariĝis fanatikulo. Li konstruigis en la kortego pilkoludejon ĉirkaŭitan de altaj muroj. Li ofte sidis sur podio en nordo ne nur por spekti, sed ankaŭ por trejni militistojn.

Ankaŭ imperiestro Wudi (140-87 a.K. sur trono) de Han-dinastio, kiu multe kontribuis por malfermi la Silkan Vojon, ŝatis pilkoludon. Pro tio liaj favorataj korteganoj kolektis lertajn pilkoludantojn el la tuta lando kaj okazigis pilkokonkurson en la pilkoludejo de la kortego. Wudi ne nur spektis ĉiun konkurson, sed ankaŭ elektis nacimalplimultanojn sur la Silka Vojo, kiuj lertis en pilkoludo, por partoprenigi ilin en la konkurso. Emociita, Wudi eĉ mem ludis kaj ordonis al literatura paĝio versi pri tio.

Ankaŭ juna generalo Huo Qubing, kiu faris

kontribuon por defendi la Silkan Vojon, estis heroo sur la pilkoludejo. Intertempe de bataloj, li gvidis soldatojn konstrui pilkoludejon en la kampadejo, okazigis kaj eĉ mem partoprenis pilkan konkurson por stimuli la batalspiriton. Laŭdire, foje pro neakurata proviantado la batalistoj dronis en malsato. Tamen la malsata Huo Qubing persistis en ludo de piedpilko.

Tiam ĉiuj ordinaraj viroj devis servi en armeo. Dum la armea vivo ili lernis ludi piedpilkon. Post milito ili revenis hejmen kaj instruis la samvilaĝanojn ludi ĝin. Tiel en la prospera Okcidenta Han-dinastio furoris la piedpilka ludo en la kortego, armeo kaj popolo, kaj ankaŭ aperis libroj pri ludartoj kaj ludreguloj.

La piedpilko de Han-dinastio estas solida kaj farita el ledokun haroj ene. La pilkoludejo estas rektangula, ĉe ambaŭ ekstretoj estas po ses duonrondaj golejoj. Por ilin gardi, la du konkursaj flankoj metis po ses golulojn. La venko aŭ malvenko dependis de nombro de la enpafitaj goloj. Ĉiu flanko havis unu gvidanton, kaj la du flankoj kune elektis unu juĝanton. Dum konkurso la juĝanto devis esti justa, kaj la ludantoj devis obei la juĝanton. El tio oni povas vidi, ke en Han-dinastio la piedpilka ludo jam estis regula.

En Tang-dinastio (618-907) la piedpilka ludo fariĝis pli amuza ol soldat-trejna kaj multe progresis la tekniko de pilkofarado. Oni uzis animalan vezikon kiel internon, plenigis ĝin per aero kaj ekstere kovris ĝin per ledokun. Tiel farita pilko riĉas je elasteco kaj estas je 300-400 jaroj pli frua ol la aer-plenigita pilko inventita de okcidentanoj en la 11-a jarcento. Tiam la piedpilka ludo havis alian karakterizaĵon: partopreno de virinoj.

El poemoj de Tang-dinastio ni povas scii, ke en la tiama kortego furoris piedpilka ludo tute sen

antagonismo, nur kun atento pri persona lerteco. Tiam ne plu ekzistis golejoj, nur unu, du aŭ dek homoj ludis pilkon per ĉiuj partoj de la korpo, kiaj kapo, ŝultroj, dorso, postaĵo, brusto, ventro, genuoj kaj piedoj. Tia prezentado reliefigas belan pozon, do ĝi pli konvenas al virinoj. Sur kupra spegulo, porcelana kapkuseno, plumujo kc. de Tang- kaj sekvantaj dinastioj ofte vidiĝis bildoj montrantaj virinojn aŭ geedzojn ludantaj pilkon. Tio signifas, ke tiam la pilkoludo jam fariĝis familia amuzo.

En Song-dinastio (960-1279) ekzistis Yuan-she, societo de piedpilka ludo, kies anoj surmetis silkajn ŝuojn kaj vestojn kaj estis rigardataj kiel plej admirataj homoj. Kaj la piedpilka ludo fariĝis unu el la plej popularaj amuzoj en la popolo. En Ming-dinastio (1368-1644), aperis multaj profesiaj stelulinoj de pilkoludo. Kun superba lerteco ili faris prezentadon ĉie. Komence de Ming-dinastio iu virino famis pro sia lerta rulado de pilko, t.e. ruli pilkon sur la tuta korpo kaj ne lasi ĝin fali. Tia lertaĵo jam estas simila al akrobataĵo. En la fino de Ming-dinastio ankaŭ la favorata kromedzino Tian de imperiestro Chong Zhen estis lerta en pilkoludo. Iu priskribis ŝian ludon per la vortoj "tiel gracie ke neniu povas sin kompari kun ŝi."

Historia libro diras, ke en Tang-dinastio la ĉina piedpilka ludo enkondukiĝis en Koreion kaj Japanion. Tiam la koreoj tre ŝatis ĉinajn vejĉi-on kaj piedpilkon. Japana antikva piedpilka libro diras: "Piedpilko devenis de Tang-dinastio." En 627-650 Japanio sinsekve sendis senditojn kaj studentojn al Ĉinio. Eble estas ili, kiuj kondukis la piedpilkan ludon en Japanion.

La ĉina antikva piedpilka ludo havis sian prosperon kaj iom post iom malprosperiĝis. Tion kaŭzis eble, ke la prezentado anstataŭis la antagonismon. ■

(Daŭrigo de p. 47)

visceroj havas ĉiu sian respondan punkton ĉe la spino. De la pendantaj bildoj mi sciiĝis, ke tibet-medicinaj kuracistoj uzas diversajn kirurgiajn instrumentojn. En tibet-medicinaj verkoj legiĝas, ke oni sukcese faris kraniotomion en la antikveco. Tamen kun disvolviĝo de la moderna kirurgio, nur tre malmultaj kirurgoj faras operacion per tradiciaj tibet-medicinaj metodoj.

La tibeta medicino alte taksas ne nur kuracon, sed ankaŭ reguligon de manĝado kaj ripozo. La tibeta medicino opinias, ke tagordo devas esti trispeca, t.e. la ĉiutaga, sezona kaj provizora. Koncerne la ĉiutagan oni devas atenti la higienon, koncerne la sezonan oni devas fari malsame en

malsamaj sezonoj, ekz. vintre pro longa nokto oni facile malsatas, tial la homa vitala energio facile konsumiĝas. Pro tio oni kutimas per sezama oleo ŝmiri la korpon, froti sin, manĝi oleriĉajn manĝaĵojn, porti feltaĵojn, sin sunumi, sin varmiĝi ĉe la fajro ktp. Koncerne la provizoran, pro malbona sanstato oni ne devas fari tro lacigan laboron. La tibeta medicino opinias, ke arbitra ĉesigo de larmado kaŭzas doloron de la kapo, koro kaj stomako. Por kuraci ĝin oni devas dormi aŭ babili kun intimaj amikoj.

Ĉe mia adiaŭo s-ro Renwang donacis al mi tibet-medican libron. Mi legis ĝin kaj ekkonis pli multe pri la tibeta medicino. ■

Sanproteka gimnastiko

LA nomita gimnastiko povas akceli sango cirkuladon de la tuta korpo. Ĝi estas utila kaj al sanprotekto kaj al kuraco. Ĝi estas taŭga precipe por maljunuloj kaj malfortuloj. La gimnastiko konsistas el 15 ekzercoj. Oni povas sin ekzerci per ĝi en la tuto aŭ en parto laŭ sia sanstato. Faru laŭ jenaj manieroj:

1. Kviete sidi. Sidu kun la kruoj krucitaj, okuloj duonfermitaj, brusto neelstara kaj langopinto tuŝanta la supran makzelon. Per viaj montraĵoj, mezaj, ringaj kaj malgrandaj fingroj malforte tenu viajn dikajn fingrojn kaj metu ilin sur viajn femurojn. Tenu vian tutan korpon en malstreĉo kaj kvieto. Per la nazo spiru 50 fojojn. La komencantoj spiru nature kaj poste iom post iom profunde aŭ tiamaniere: ĉe la enspiro pli forte ŝveligu vian ventron kaj ĉe la elspiro pli forte kavigu ĝin.

Post la sidado profunde spiru 50 fojojn, kio estas utila por kvietigi vin kaj plibonigi la sango-cirkuladon de la tuta korpo.

2. Ekzerco de la oreloj. Masaĝu viajn heliks-ojn per viaj manoj 18 fojojn kaj post tio ŝtopu viajn eksterajn akustikajn meatojn per viaj tenaroj kun la fingroj sur la okcipito. Metu vian montran fingron sur la mezan kaj per ili kune frapetu la okcipiton 24 fojojn.

Masaĝo de la heliksoj akriĝas la aŭdkapablon, preventas kaj kuracas orelzumadon kaj surdon, dum la delikata frapo de la okcipito reguligas la funkcion de la centra nervo kaj kuracas kapdoloron kaj kapturton.

3. Krakigo de la dentoj. Kun plena atento krakigu viajn dentojn 36 fojojn. Tio estas utila al firmiĝo de la dentoj kaj prevento de dent-malsanoj.

4. Ekzerco de la lango. Turnu vian langon en la buŝo po 18 fojojn dekstren kaj maldekstren. Ne englutu la salivon sed faru tuj la sekvantan ekzercon.

5. Gargaro per salivo. Fermu vian buŝon kaj gargaru 36 fojojn per la salivo estigita en la lango-ekzercado kaj poste englutu ĝin tri fojojn. Tio estas utila al digesto kaj apetito.

6. Froto de la nazo. Frotadu la dorsojn de viaj dikfingroj ĝis varmiĝo kaj metu ilin ambaŭflanken de la nazo. Per viaj dikfingroj frotu viajn nazlobojn po 18 fojojn. Tio estas utila al prevento de malvarmumo kaj kuraco de kronikaj nazaj malsanoj kaj alerga rinito kaj ankaŭ al mildigo de naz-ŝtopiĝo.

7. Ekzerco de la okuloj. Duonfermu viajn okulojn, iom kurbigu viajn dikfingrojn kaj per iliaj

artikoj malforte frotu viajn palpebrojn po 18 fojojn. Per la dorsoj de viaj dikfingroj malforte frotu viajn brovojn po 18 fojojn. Duonfermu viajn okulojn kaj turnu viajn okulbulbojn dekstren kaj maldekstren po 18 fojojn. Tio estas utila al prevento de okulmalsanoj kaj fortigo de vid-kapablo.

8. Froto de la vizaĝo. Frotu viajn manplatojn ĝis varmiĝo kaj per ili frotu vian vizaĝon tiamaniere: de la frunto malsupren kaj preter la nazo ĝis la mentono, kaj inverse, de la mentono supren ĝis la frunto. Faru tion supren kaj malsupren po 18 fojojn. Tio estas utila al la sano de la haŭto de la vizaĝo.

9. Ekzerco de la nuko. Krucu la fingrojn de viaj manoj kaj per ili tenu la nukon, rigardu supren, dume forte tiru la nukon malsupren per viaj manoj. Faru tion 3-9 fojojn. Tio estas utila al kuraco de ŝultrodoloro kaj nebuleca rigardo.

10. Knedo de la ŝultroj. Per via dekstra manplato knedu vian maldekstran ŝultron 18 fojojn kaj per via maldekstra manplato knedu vian dekstran ankaŭ tiom da fojoj. Tio estas utila al prevento kaj kuraco de ŝultra artikito kaj skapola periartikito.

11. Movo de la kubutoj. Duonpugnigu viajn manojn, fleksu viajn kubutojn en angulo de 90 gradoj. Movu la kubutojn antaŭen kaj malantaŭen po 18 fojojn. Tio estas utila al moviĝo de la ŝultraj artikoj kaj pektoraloj kaj ankaŭ al la funkcio de la visceroj.

12. Froto de la lumboj. Frotu viajn manojn ĝis varmiĝo kaj per ili frotu viajn lumbojn po 18 fojojn. Tio estas utila al mallaciĝo de la lumbaj muskoloj, prevento kaj kuraco de lumbalgio, dismenoreo kaj amenoreo.

13. Froto de la kokcigo. Per viaj montraĵoj kaj mezaj fingroj frotu la lokon ambaŭflanke de via kokcigo po 36 fojojn. Tio estas utila por preventi kaj kuraci anuso-ptozon kaj hemoroidojn.

14. Froto de la umbiliko. Frotu viajn manojn ĝis varmiĝo. Per via maldekstra manplato frotu la lokon ĉirkaŭ la umbiliko ĉe la dikaj intestoj, t.e. de via dekstra subventro al via dekstra ventro, de via maldekstra subventro al via maldekstra ventro, kaj inverse. Tion faru po 100 fojojn. Tio estas utila al plifortigo de la funkcio de la visceroj kaj reguligo de ilia laboro.


15. Knedo de la genuoj. Knedu viajn genuojn per viaj manplatoj po 100 fojojn. Tio estas utila por preventi kaj kuraci artikajn malsanojn kaj plifortigi la gambojn. ■


Konka skulptaĵo

Konka skulptaĵo estas metiartaĵo farita per ĉizado, inkrustado, kungluado ktp.

Ĝi prezentas la rakonton "Sun Wukong Trifoje Batis Skeletospiriton" el la ĉina klasika romano "Pilgrimado al la Okcidento" verkita de Wu Cheng'en. Dum la pilgrimado al la Okcidento bonzo Xuanzang kaj liaj disĉiploj renkontis Skeletospiriton, kiu volis manĝi la karnon de la bonzo por longe vivi. Kun tiu celo, ĝi trifoje transformiĝis en homon por trompakiri la bonzon, sed ĝiaj ruzaĵoj estis trifoje malkaŝitaj de Sun Wukong, kiu foje-refoje savis sian majstron...

Laŭ tiu mita rakonto la Guangdong-a Metiartaja Kompanio faris tiun verkon. Profitante de la naturaj vejnoj kaj poluro de konko, metiartistoj lerte prezentas ne nur la akran luktadon inter Sun Wukong kaj Skeletospirito, sed ankaŭ pitoreskajn pejzaĝojn kun mitaj koloroj.





Baobaboj en
Madagaskaro
de **JCL. THU-
MERELLE**
(Belgio)



En aŭtuno
de **HARRI J.
MELASNIEMI**
(Finnlando)

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九七年第十一期
(本刊代号: 二—九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2